

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

Vol. 11, N-ro 55.

MELBURNO.

Jan.-Feb., 1953.

With Esperanto around the World

At the General Conference of UNESCO in Paris, the following resolution was adopted on Dec. 10, 1952:—

“The Director-General is authorized to communicate to Member States the international petition in favour of Esperanto, which has been submitted to the United Nations and forwarded to UNESCO, and to undertake, in the light of comments received, the necessary preparatory work to enable the General Conference to decide, at its Eighth Session, upon the action to be taken on this petition.”

● **ARGENTINE:** A record number of 90 students joined an Esperanto class at Buenos Aires; a further 40 students are learning by correspondence course. Classes are also held in a number of country centres—in Eva Peron (with 41), in Venado (with 25) and in Bell Ville (Cordoba) where the deputy principal and some teachers of the local school joined the classes.

● **BRAZIL:** Cardinal Jaime de Barros Camara, Archbishop of Rio de Janeiro, declared his interest in Esperanto and said that he will give it his full support, because it is dedicated to the cause of good.

● **GREAT BRITAIN:** We hear that new Esperanto Classes have been started in Bournemouth, Colchester, at the Evening Institute of Liverpool, at the Technical School and a special class for grammar school boys in Huddersfield, at South Shields, Sutton, Urmston and Wolverhampton. New clubs have been formed at the Adult Education Centre at Chatham, in Harrow and Woverhampton. An exhibition at the Municipal College of Bournemouth was opened by the Mayor. The Provost of Derby welcomed the Conference of the East Midlands Esperanto Federation.

THE ESPERANTISTS OF WESTERN AUSTRALIA
EXPECT YOU FOR A GLORIOUS CONGRESS!

Mail your Congress Fee (25/-) now and reserve your accommodation.

Address all enquiries to Miss O. Stempel, 96 Blencowe Street,
West Leederville, W.A.

At the University College of London, Professor J. C. Flugel, famous psychologist, lectured in Esperanto on "Paradoxes in the Struggle for a Psychic Equilibrium." Prof. Flugel is president of the British Association for Esperanto in Science.

● **GUATEMALA:** An international exhibition of children's drawings, organized under the auspices of the Ministry of Education, used Esperanto for gathering the exhibits from 22 countries. The official catalogue was printed in Spanish and in Esperanto. The leading daily newspaper "Diario de Centro Americo" published a full-page report about the exhibition.

● **SPAIN:** The latest radio station to broadcast a weekly Esperanto programme is the Government-owned

station "Radio Alerta" in Valencia. The station has allotted 20 minutes to this broadcast under the general title "Esperantista Mikrofono". Other Spanish stations broadcasting Esperanto programmes are Radio Madrid, Radio Manresa and Radio Tarragona.

● **SWITZERLAND:** Initiated by Dr. Tima Peter-Ruetschi (Zurich), the Adult Education Centres of Brussels, Copenhagen, Florence, The Hague, London, Manchester, Paris, Salzburg, Stuttgart and Zurich are at present carrying out a programme of co-ordinated Esperanto classes. Students will have an opportunity to correspond with each other after the fourth lesson.

● **URUGUAY:** More than 3000 visited an Esperanto exhibition in the capital Montevideo recently.

9th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

2-7 JANUARY, 1954, PERTH, W.A.

Mail your Congress Subscriptions NOW to
Miss O. Stempel, 96 Blencowe Street, West Leederville, W.A.

Attending Members: 25/-. Non-attending Members: 5/-.

Donations gratefully accepted.

The Congress will take place in the University, where moderately priced accommodation also is available. (Full Board about £5/5/-) Reserve your accommodation NOW. Open a special Congress Savings Account with your local Savings Bank. £1 per week will pay your fares to Perth for a glorious Congress.

BUY ESPERANTO BOOKS

To your local or public lending library give a copy of "LIFE OF ZAMENHOF," by Dr. Privat. English, cloth-bound, only 5/6.
Grammar & Commentary (Cox) 10/-
Practical Course in E-o (Szilagy) 3/-
English-Esperanto Dictionary
(Fulcher & Long) 16/6
Esperanto-English (Millidge) . . 17/6
Plena Vortaro de E-o 31/-
Leteroj de Zamenhof—
Vol. I 27/6
Vol. II 27/6
The Language Problem (Durrant) 2/-
Vivo de Zamenhof (Privat) . . 7/-
Fundamenta Krestomatio
(Zamenhof) 15/-

SUBSCRIPTIONS RECEIVED

Mesd. A. Hintze, E. E. Turnbull, D. Wishart, 12/6; Misses E. Styles, V. Cox, G. Sims, Deaconess Magarey, 12/6; R. Telfer, 10/-; Messrs. Kevin Smith, H. W. Cohen, O. Davies, J. Gottlieb, J. Maddern, J. Couche, R. Thomson, Rev. Cowling, N. Cowley, R. Perry, Rev. Rymer, E. Hanks, P. Holmes, R. Banham, E. McKenzie, H. Koppel, C. Ballard, E. Loorits, J. Oki, T. Suess, 12/6; M. Leerveld, 6/3; Donation, £3/12/6, A.T.; Sales Rondo, 5/10.

SPECIAL THANKS

to our supporters: Miss A. Curtis (Beenleigh, Qld.), 30/-; Mr. R. Latimer, 20/-; Mr. A. Newman (Cangai, N.S.W.), Mr. John Collier (Albany, W.A.), 40/-.

De La Prezidanto

Karaj Gesamideanoj,



Sur la sojlo de la nova jaro la Esperantista movado en Aŭstralio sin trovas mezvoje inter Sidnejo kaj Perto, do metorigardante al la pasinta kongreso, ni analizu ties decidojn kaj tiel preparu nin por la venonta ĉe la okcidenta ĉefurbo.

Kiel prezidanto mi sopiras novan statuton por ebligi pli efikan agadon fare de la estraro, sed D-ro Fridenbergs, kiu estis komisiita en Sidnejo tion ellabori, jam bone plenumas sian taskon, kaj sen ia dubo ion tre akceptindan prezentos al ni en Perto.

Jes, mi multon esperas por nia movado el la Naŭa Kongreso, sed ni ĉiuj bone konstatu, ke la sukceso de ia kongreso ne nur dependas de la organizantoj, sed ankaŭ eĉ pli de la partoprenantoj, do, ankoraŭ laborante pri la plenumo de la decidoj de la pasinta, ni jam pripensu tion, kio estas diskutinda ĉe la venonta, ne prokrastante ĝis la lasta momento. Neniu movado povas resti senmova. Aŭ ĝi progresas aŭ ĝi—sed ni ne diru la vorton. Ni pensu nur pri progreso.

Dezirante al vi ĉiuj tre prosperan novan jaron, mi donas al vi la devizon "Preparu por Perto", kaj elkore instigas ĉiun samideanon aliĝi kiel eble plej frue al la Naŭa Tutaŭstralia Kongreso, tiel kuraĝigante niajn Pertajn amikojn per nia treege necesa subteno, se ne persona, almenaŭ financa. De via subteno dependas la estonteco.

Via prezidanto,

KEN G. LINTON.

Nia Gast-Artikolo

Ciam dezirante doni al nia legantaro interesan legomaterialon, verkitan de elstaraj Esperantistoj, ni petis la ĝeneralan sekretarion de U.E.A., s-anon C. C. Goldsmith, verki artikolon por la serio "Nia Gast-Artikolo". Li afable kompleksis al la peto de nia sekretario, kaj en la ĉi-suba artikolo li kondukas nin malantaŭ la kulisojn de U.E.A.

UNU TAGO EN LA OFICEJO DE U.E.A.

Dankante vin pro la peto verki "gast artikolon" por La Rondo, mi opinias ke por viaj legantoj informo laŭ tiu sugesto via certe estos pli interesa ol io pri mia persona Esperantista vivo. Mi estas nur pli-malpli normala viro, kaj tute certe la granda plimulto el miaj personaj spertoj similas al spertoj de aliaj Esperantistoj—eĉ en fora Aŭstralio!

Ni komencu la tagon. Je la 8-a matene alvenas la poŝtisto, kaj hodiaŭ per la unua livero alvenis 49 leteroj. Kvin minutojn poste mi eniras la oficejon kaj komencas malfermi la leterojn. La nuraj malfermo kaj trarigardo de la leteroj okupas pres-

kaŭ unu horon—kaj sekve, se alvenas 4-aŭ 6-paĝa letero mi flankenmetas ĝin por tralego en la vespero. Tio okazas sufiĉe ofte kaj do estas konsilinde ne skribi vivhistorion se oni vere bezonas diri nur ke oni ŝanĝis sian adreson! Jen alia afero kiu ĉiam ĝenas nin: eble kvinono de tiuj kiuj skribas al ni ne skribas siajn adresojn sur la leterpapero, sed nur sur la koverto. Ĉar ni kutime forĵetas la kovertojn ni estas tre malkontentaj, kiam respondante ni devas elserĉi adreson en la registroj.

Post la leteroj sekvas la ordigo de la laboro por la aliaj oficistoj. Unu ricevas la laboron pri enskribo de kotizoj, novaj membroj, adresŝanĝoj (ni tre ŝatus ke nia Komitato enkonduku novan regulon kiu malpermesus adresŝanĝojn!), k.t.p. Ĉar unu letero ofte enhavas informon pri pago de pli ol 20 kotizoj, pri enoficigo de kelkaj delegitoj, pri 4-5 adresŝanĝoj, tiu laboro estas sufiĉe prema, kaj speciale en la periodo Novembro ĝis Marto. Poste ni pretigas la mendojn, nun sufiĉe oftaj kaj sufiĉe grandaj—normale ni forsendas meze 100 ĝis 150 librojn ĉiutage.

Tiam nia stenografistino devas aŭskulti mian voĉon dum unu ĝis du horoj, ĉar mi diktas la respondojn al

ludis la pianon, s-roj Davidson kaj Turvey ludis la akordionon kaj s-no Monckton kantis amuzkantojn.

Dum la jaro ges-roj Rutland kaj f-ino Dash revenis de Europo, plenaj de entuziasmo pri la movado. Nas-kiĝis al ges-roj Ch. Hartman filino, Jean Marylin. Ni gratulas la feliĉan paron. Du kursoj, unu por komencantoj kaj unu por progresintoj daŭris tra la jaro kaj havis bonan sukceson. Venontjare ni ankaŭ aranĝos 2 kursojn; s-ro Chandler estos tiun por progresintoj kaj f-ino Smith tiun por komencantoj.—E. W. Chandler.

● **BRISBANE:** La Zamenhofa bankedo okazis kiel kutime en "Hotel Canberra". Prez. T. Suess bonvenigis 18 anojn kaj laŭlegis salutojn de s-anoj el aliaj aŭstraliaj ŝtatoj. Poste, N. Love montris lumbildojn pri "Por-doj kaj Enirejoj" en Brisbane, Muzikaj eroj, kantoj kaj humoraj prelegoj kompletigis la vesperon. Je la fino ni aŭskultis radio-stacion 4 BK, kiu disaŭdigis memorigan paroladon de s-roj Parry kaj Littleton.

Nova kurso komenciĝis 13 Jan., gvidata de la nederlanda esperantisto s-ano A. d'Oliveyra, kiu antaŭ ne-longe enmigris Aŭstralion. (Laŭ leteroj de f-no E. B. Carrick).

● **HOBART:** Nia estona s-ano Eino Loorits raportas ke li ĵus aĉetis domon kaj kore invitas ges-anojn el tuta Aŭstralio akcepti lian gastamon. (Adreso: 203 Harrington St., Hobart.) Li ankaŭ raportas ke s-ro Guilbert instruas E-on en Toc H al malgranda nombro da interesuloj.

Infan - Augulo

● **PERTH:** La bonaj ekzamenaj rezultoj montris la intereson kaj laboron de la infanoj dum 1952. Ĉiu plenumis kun honoro la primaran ekzamenon, kaj knabino, kiu havas nur 12 jarojn sukcesis plenumi kun honoro ankaŭ la unuagradan ekzamenon. Je 20 Dec. okazis pikniko en "King's Park" por klubanoj kaj infanoj. Post ludoj kaj temaĝo, f-ino Stempel donis atestejn al la 6 sukcesaj knabinoj. Bedaŭrinde la sola knabo ne povis ĉeesti la ekzamenon.

Al ĉiuj geknaboj tra Aŭstralio la Esperantaj Infanoj en Perto sendas novjarajn bondezirojn.—A. B. Sedgley.

● **ADELAIDE:** De Meredith Bartlett ni sciigis kun surprizo kaj plezuro pri la bona laboro farita de f-ino

Kempson dum la pasinta jaro. Post la instruhero ŝi gvidis ĉiusemajne infankurson ĉe Woodville Lernejo. Proks. 18 aliĝis je la komenco. Periodaj ekzamenoj kun premioj kaj ekskursoj kuragiĝis la lernantojn kaj revokis ne regulajn ĉeestantojn. Babilado kun Meredith montris kiel bone ŝi instruis.

Gratulon al f-ino Kempson. Ni esperas ke malgraŭ la multaj malfacilaĵoj ŝi povu daŭrigi sian bonan laboron.—F.F.K.

Pro spacomanko ni daŭrigos nian serion "Frank Halls Raportas" nur venontnumere.

ESPERANTISTO KAJ LA INTERNA IDEO

El la antipodo atingas nin kiel eĥo la disputo de la eŭropaj samideanoj pri la valoro de la Interna Ideo por nia movado. Kaj la areno de la kon- testo de diversopinianoj fariĝis "Bole- tin", la organo de la Hispana E- Federacio. S-ro Bosch ekkrias "For la Interna Ideo", kaj invitas montri al la publiko, ke Esperanto permesas ŝpari monon, pliigi la profitojn, akceli komercan trafikon, interŝanĝi pli facile ĉiuspecajn konojn ktp." S-ro Eŭma iras eĉ pli radikale en tia direkto, trovante ke en la nunaj cir- konstancoj eĉ eldonado de pure litera- turaj kaj beletristikaj revuoj estas superflua, "ĉar nur malmultaj elek- titaj personoj deziras sin distri aŭ amuzi per esperantaj senenhavaj belajoj." Cetere mi devas emfazi, ke tian surprizantan konkludon li faras konstatante la formorton de la "Liter- atura Mondo", kiu por tiuj, kiuj legis ĝin dum jaroj, ne povis ne esti perlo de la Esperanta spirito, kvankam— tion oni ja devas konfesi—laŭ pure arta kaj estetika vidpunkto.

Finfane, tia pensmaniero ne estis nova kaj simile juĝis jam s-ano E. Lanti, la fondinto de SAT. Cu tiuj samideanoj vere estas nur material- istoj, pozitivistoj aŭ utilistoj, ĉiel trovis iliaj oponentoj kaj defendantoj de la Interna Ideo, estas pridube, kaj oni povas supozi ke ilia opinio estas diktata nur de taktikaj kaj propa- gandaj konsideroj.

Sed tio eble gravas malmulte kom- pare kun la konstato, ke vere ekzis- tas nun ĝenerale observata tendenco

elimini de ĉiu ajn movado idealisman, kredan, mistikan kaj aliajn neraciajn elementojn. Sed ĉu racio sola povas solvi ĉiujn problemojn? Ĉu ne estas bezonata ankaŭ pura kredo por atingi celon? Kaj ĉu fine nia pensproceso ne estas ofte forte kolorigita kaj influata de niaj emocioj kaj deziroj? Se jam homa racio estus tiel ĉiopova, ĝi jam antaŭ longe estus elpensinta kaj realiginta pli stabilan kaj feliĉan socialan ordon por la homaro, ol la eterna sidado sur barelo de dinamito.

Oni estis inklinita dubi ankaŭ pri tio, ĉu pagigoj oferi la Internan Ideon (ni ne timu konfesi ke ĝi enhavas grandan kvanton da kredo kaj eble eĉ iomete da mistiko) kaj literaturon esperante akiri per tio taktikajn avantaĝojn sur propaganda kampo. La pere de Esperanto promesotaj profito, monŝparo, trafiko kaj akireblaj konoj (laŭ s-ro Bosch) per si mem kaj en si mem nenian valoron havas, se ili ne donas al homo kontentigon kaj tiurilate homoj estas tre diversaj. Karakteriza estis la respondo de s-ano M. C. Butler, ke "la sola afero, kiu tenis min konstanta, estas la Interna Ideo kaj la literatura kvalito de la lingvo. Komercio havas por mi nenian intereson." Kion fari kun tia tipo de Esperantisto, kaj mi suspektas ke la plimulto de la dumvivaj Esperantistoj apartenas al tiu tipo.

Jes, homoj estas tre diversaj ke se apartaj grupoj de ili povas esti allogitaj ne de unu, sed de diversaj aspektoj de la Esperantismo, des pli bone. La agnosko de la Interna Ideo bezonata de la plimulto de la nuna Esperantistaro tute ne ekskluzivas la altiron de eĉ milionoj da novaj Esperantistoj, kiuj preferas aliajn, pli palpeblajn valorojn. Mi nur volas aserti, ke en la nuna stadio de nia malriĉo kaj malforto oni povas kredi pli al la fideleco de la adeptoj de la Interna Ideo, kiuj ĉion donas kaj nenion postulas, ol al la fideleco de tiuj kiuj eble ne trovos tuj la al iii promesitajn profitojn. Kaj estas pli bone konservi almenaŭ fortan sed malgrandan kernon ol riski per ĉio.

Konklude, ni povas konstati ke Zamenhof mem trovis sufiĉe larĝan bazon por nia movado, sufiĉe larĝan, por ke en ĝi trovi lokon la serĉantoj, idealistoj kaj kredantoj.

"Se nin, la unuajn batalantojn por E-o, oni devigos ke ni evitu en en nia agado ĉion idealan, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por E-o, ni neniiigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: Kun tia E-o, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komercio kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!" (Parolado ĉe la 2-a Kongreso, Genevo 1906.)

Kaj ankaŭ por la praktikuloj troviĝas loko: "Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon E-o, tute egale por kiuj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu Esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga. (Deklaracio de Boulogne-sur-Mer, 1905.)

Ni ne povas nei, ke Zamenhof, kiel vera Majstro, havis sufiĉe vastan vizion pri la amplekso de Esperantujo.

—Dr. Andrew Fridenbergs.

Recenzoj

Kongresa Universitato de 38a Japana Kongreso 1951.

Eld. Nagoja Esperanto-Societo.

2/9 ĉe A.E.A. (Box 2122T, G.P.O., Melbourne).

Ne ofte ni havas la bonŝancon foliumi libron tiel altnivelan kiel estas ĉi tiu 44-paĝa broŝuro. Ĝi konsistas el kvar prelegoj kiujn donis respektive kvar profesoroj okaze de la Japana Esperanto-Kongreso. La prelegistoj estas ne nur specialistoj sed ankaŭ Esperantistoj, kaj en mallonga antaŭparolo Profesoro F. Egami skize prezentas ĉiun laŭ lia fako.

En "Esperanto kaj la Internaciismo," S-ro Takasugi-Iĉiro, profesoro de angla lingvo de Sizuoka Universitato, ekzamenas objektivite la rilaton inter la progreso, aŭ malprogreso, de Esperanto en pluraj regnoj, kaj la sinteno de la koncernaj registaroj rilate al internaciismo. Tre frapaj estas la faktoj prezentitaj pri la malapero de Esperanto en nuntempa Sovet-Unio; eĉ pli frapa la simileco de agadmaniero en landoj, kiuj laŭnome tenadas sin al tute malsimilaj idealoj. La prelegisto memorigas nin

pri la alvoko de Hitler al la eŭropaj landoj fondi novan Staton de Unuigitaj Nacioj, sed unu nepra kondiĉo estis ke tiu unueca Eŭropo havu kernon ĉirkaŭ kiu la aliaj landoj turniĝu, kaj ke tiu kerno estu Berlino! Ankaŭ en la Japana plano por Granda Orienta Sfero Kooperativa estis la postulo ke Japanujo estu la kerno por tiu asocio de "egalaj" nacioj. Paralele kun ĉi tiuj du projektoj, ni ricevas bildon pri la nuna sinteno de la Sovet-Unio inter la "liberigitaj" satelitoj, ". . . la propagando de patriotismo interne, kaj la propagando pri la gvida rolo de la Sovet-Unio ekstere."

"Semo Semita," de Jukito Oota, prof. de plantfiziologio, temas pri tri diversaj aferoj: Lotusaj semoj kiuj, kvankam oni arkeologie garantias ke ili havas aĝon de almenaŭ mil jaroj, ankoraŭ estas ĝermkapablaj.

Nova speco de akvomelono sen semoj, produktita ne per selektado sed per tute nova procedo, estas la dua afero, kaj la tria estas la fabo—el kio fontas ĝia mirinda kapablo rapidege kreski? La tri temoj estas science traktataj en maniero sufiĉe teknika por fakuloj, sed interesplena por laico, kaj en la fino la tri fadenoj estas kunplektitaj en tuton kiu estas tre grava en la esplorado pri fatala malsano ĉe homoj.

S-ro Hasegawa-Riej, prof. de jura fakultato, en "Nova Ordo en Homa Mondo, donas majstrajn resumojn kaj analizojn pri la evoluado de la homa socio, kaj atentigas pri la rapide ŝanĝantaj kondiĉoj de la nuna tempo. Li formulas la problemon kiu la mondo devas fronti. La akcelado ĉe la kulturo kaj tekniko postulas novan jurpolitikon. Ni jam pasis el la sistemo de fort-politika ekvilibro en tiun de du-poluseco, en kiu ĉiu ŝtato estas ano de unu aŭ alia el du grupoj kiuj ĉirkaŭas la du grandpotencojn. Ĉu la neevitebla Tutmonda Unuiĝo venos pere de konkero aŭ de interkonsento?

La kvaran prelegon, "Ĉu ekzistas Edukado al la Feto?", donis D-ro Hideo Yagi, prof. de Akus-Ginekologio. Li tre interese ekzamenas la popularajn kredojn pri la efiko de antaŭ-naskaj influoj sur la idon. Ni trovas kun surprizo kiom mondskalaj estas pluraj superstiĉoj kiujn kredis

nij avinoj! Samtempe ni lernas ke feta edukado estas "ĝusta kaj science kredinda ĝis certa grado".

Ĉe ĉiuj kvar prelegoj la lingvo-uzo estas facila kaj plaĉa, malgraŭ la sciencaj temoj, kaj atestas la altan nivelon de la Japana Esperantomovado. Tamen troviĝas unu-du ne-Zamenhofaj uzoj, kiel ekz. "pasinto" kaj "estonto", anstataŭ pasinteco, kaj estonteco. Preso kaj papero estas bonaj.

La Japana Esperanto-Kongreso en ĉi tiu libroto certe donis al ni valoran materialon por ekzercado de la intelekto. Ni citu, kun plena aprobo, la vortojn de Prof. F. Egami: "Por mi estas granda ĝojo rekomendi tiun ĉi broŝuron al la tuta esperantistaro."

—I.P.H.

LA BALENODENTO

Jack London. Trad. W. Auld. Eld. F. Maitland, London. Prezo 1/6 ĉe AEA Libroservo.

En tiu 11-paĝa rakonto ni unufoje ĝuas prozaĵon de atentinda poeto E-a. Auld klare redonas bildon el tia sinofera vivado, kian devis suferi la misiistoj-civilizantoj de la Fiĝianoj, kiam tiuj estis ankoraŭ kanibaloj.

La streĉa intereso de la verketo donas apetiton por pli longa, pli riĉenhava novelo de la Usona majstro. Li fekunde kreis en tiu speco, kaj oni povus elekti pli gravan specimenon, kiu ebligus taŭgan takson de lia literatura merito.

Bona lingvaĵo. p. 4: Pli poste dum la tago . . . vizitis . . . (Poste en la tago . . .). Pli poste (por "later") estas nenecesa. Li venis poste, kaj ŝi pli poste. Tie la "pli" havus forton. "dense" anst. "tre proksime": "li . . . dense sekvate . . . kaj mem dense sekvante . . ."—ROBO.

U.E.A.—JARLIBRO 1952, 2-a PARTO

kun unua parto de Fervoja Terminaro, kaj kun resumaj raportoj de la progresoj de E-o dum la pasinta jaro. Nur por Individuaj membroj de U.E.A. (Aliĝu ĉe Aŭstr. Cefdelegito L. Pfahl, 37 Seymour St., Croyden Park, N.S.W.)

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

Vol. 11, N-ro 56.

MELBURNO.

Marto - Aprilo, 1953.

Governments Study Esperanto

(By R. L. Harry)

Last month 65 governments received a letter from the United Nations Educational, Scientific and Cultural Organisation, drawing attention to the resolution on Esperanto adopted by the General Conference in Paris last December. (See *La Rondo* for February.)

Enclosed was the petition lodged with the United Nations by the Universal Esperanto Association on 2nd August, 1950, and forwarded by the United Nations Secretariat to the Secretariat of UNESCO. The letter recalled that with the petition were received four volumes containing the original signatures of 459 persons in 18 countries and of the qualified representatives of 484 non-governmental organisations. It added that according to information supplied by the Universal Association, the total number of individual signatures which they have collected is 875,432, while the 488 non-governmental organisations signing the petition represent altogether 15,454,780 registered members.

The Acting Director-General asked all governments, including the Australian Government, to let him have at their convenience, but **in any event before 1st June, 1953**, any information, views or observations which they might wish to furnish. He concluded: "It would be especially useful to know how far the teaching and use of Esperanto extend in your country, the results obtained, and what practical plans, in your Government's view, should be submitted to the General Conference at its

Eighth Session to give effect to the hope expressed in the attached petition." The hope referred to is "that the United Nations will help to spread the use of this language in every possible way; for example, by encouraging its teaching in schools where teachers are available, and developing its use in travel, international commerce and correspondence."

The resolution adopted by UNESCO, referring to the petition on Esperanto, and calling for comments by Governments, is much more concrete than the "study of the problems connected with the intellectual and moral relations between peoples to which the diversity of languages gives rise" originally suggested by the UNESCO Secretariat. The change was due to the initiative of the Swiss Government, the representations made to their governments by the national Esperanto Associations, including A.E.A., and the effective advocacy in Paris by the official observers for U.E.A., Mr. E. D. Durrant and Dr. I. Lapenna. The significance of the resolution has been summarised by Dr. Lapenna as follows:—

- (a) U.E.A. can now obtain consultative status with UNESCO.
- (b) All member-states will be given objective information about the Petition.
- (c) National associations can more easily collaborate with the national UNESCO Commissions.
- (d) In the next two years Esperanto will be considered in the

- UNESCO Secretariat as a special question.
- (e) The UNESCO Secretariat will report objectively about Esperanto to the General Conference in Montevideo in 1954.
 - (f) If ever UNESCO deals with the general problem of languages in international relations U.E.A. must be invited to collaborate.
 - (g) The Resolution can be used widely to show the importance of Esperanto.
 - (h) This success will give new energy and new enthusiasm to all Esperantists throughout the world.
 - (i) Esperantists not yet members of U.E.A. will, it is hoped, join the Association and contribute to further successes.
- Although Dr. Lapenna speaks of

the next two years, the decisive period so far as the Australian Esperanto Association is concerned is the **next two months**. The Australian Government will naturally look to our Association for information on the teaching and use of Esperanto in this country and for suggestions on practical plans which can be submitted to the Montevideo Conference. In the preparation of this material the A.E.A. Committee will be seeking the help of each League, Club and individual member. The reply sent by the Australian Government will also be influenced by the number and effectiveness of representations made by organisations and individuals to Members and Senators in the various States. Prompt and concerted action will assist in achieving a major step forward for Esperanto, not only in Australia but also internationally.

THE ESPERANTISTS OF WESTERN AUSTRALIA EXPECT YOU FOR A GLORIOUS CONGRESS!

Mail your Congress Fee (25/-) now and reserve your accommodation.

Address all enquiries to Miss O. Stempel, 96 Blencowe Street,
West Leederville, W.A.

PYKE MEMORIAL EXAMINATION

The 1952 Pyke Memorial Examination, postponed from November, was held on 11th March, 1953.

Western Australia and Victoria were the only States represented. The winner of the Special Prize for £5/5/-, awarded each year to the candidate who, though having been learning Esperanto for 12 months or less, yet received the highest number of marks, was Miss D. Leach, of Western Australia, to whom we offer our congratulations. An excellent paper was handed in by Mrs. Humphries, of the Melbourne Esperanto Club, who received the diploma, passing with distinction. Another Melbournean, Mr. J. Kew, was also a successful candidate.

The 1953 Examination will be held in November, the arrangements being in the competent hands of Mr. F. R. Banham, who has consented to act as Chief Examiner.

—FLORENCE RAWSON.

SUBSCRIPTIONS RECEIVED

Mesd. Caldera, Humphries, 12/6; D. Baesjou, 13/-; Hill, 6/3; Misses E. Carrick, A. Godfrey, E. Godfrey, H. Hendrickson, Kempson, Perry, Samblebe, L. Walford, 12/6; Messrs. Dr. Caldera, M. Cohen, E. Costa, E. Crowe, W. Drummond, Fidge, Dr. Frdienbergs, Gleisher, D. Guilbert, Kew, Lanyon, Ling, P. Schwerin, I. Slavoff, V. Smith, E. Thompson, 12/6; J. Dwyer, 25/- (2 years); A. Shain, 25/- (2 years); Bricb. E-Soc., 12/6; Canberra E-Club, £7/10/6 (12 members); Sydney E-Soc., £7/10/- (12 members); E-League of W.A., £14/7/6 (23 members); Mrs. Byatt, Mr. H. N. Love, 12/6; Donation, 6/1; Sales Rondo, 1/10, 3/10.

SPECIAL THANKS

.. Special Thanks to our supporters for donations: Mrs. Fent (Melbourne), 32/6; Dr. Fred Williams (Melbourne), 21/-; Miss Ivy James (Melbourne), 20/-; Miss F. Kemp (Melbourne), 20/-; Mr. A. Saar (Perth), 20/-; Mr. F. V. Taylor (Albury, N.S.W.), 20/-.

TRIA KONGRES-BULTENO

Per tiu-ĉi numero de "La Rondo," ĉiu leganto ricevas 2 ekzemplerojn de la aliĝilo nia kongreso. Por garantiigi logadon ĉiuj anoj estas petataj TUJ sendi la aliĝilon al la kongreskomitato. Tiuj, kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povos persone ĉeesti la kongreson, almenaŭ aliĝu kiel Subtenanto (7/6) aŭ kiel Patrono (laŭvole pli ol 25/-).

3-a listo de aliĝintoj

10. f-no A. Curtis (Beenleigh, Q'land)
11. s-no A. Hintze (Melbourne)
12. s-ro S. Hicks (Perth)
13. D-ro A. Einihovici (Perth)
14. s-no I. Einihovici (Perth)
15. s-no R. Strassberg (Perth)
16. f-no H. Gibson (Perth)
17. s-ro L. Claxton (Perth)
18. s-no G. Pollard (Perth)

Bonaj ekskursoj estos aranĝotaj kaj kongresanoj sendube ĝuegos la kongresmajnon en bela Perth. Helpe la Perth-ajn samideanojn fari la kongreson granda sukceso. Sendu vian kotizon (25/-) al f-ino O. Stempel, 96 Blencowe St., West Leederville, W.A.

**PRETIGU VIN
de Karl Vanselow**

Jam estas nia lingvo de l' espero ne revo nur sed feliĉiga vero.

Do ni ĝin uzu por la beno
de la homaro ĉiam pli.

Por landkongresa partopreno
pretigu vin
kaj venu ankaŭ vi.

(El poezia libreto "Nia Lingvo Esperanto")

Australia Kroniko

● **PERTH:** Per tre sukcesa film-vespero komenciĝis la socialaj aferoj de la Ligo por ĉi-tiu jaro. Malgraŭ varmega vetero pli ol 40 personoj ĉeestis. Post salutoj de la Prezidanto s-ro Hawks) kaj pianoludado, sekvis interesaj filmoj montritaj de la Poŝt-Oficejo. Novaj pri la progreso de E-o tra la mondo kaj vespermanĝeto kompletigis la vesperon. Dum la vespero estis honorata la nomo de Sir Hal. Colebatch, patrono de 'Amikoj de E-o', kies enteriĝo okazis samtage. Li ĉiam sincere subtenis nian laboron. Nun ni planas havigi al ni alian eminentulon kiel Patronon. 3 klasoj, alt-grada mezgrada kaj elementa, kome-

ciĝis por plenkreskuloj.—O. Stempel.

Klasoj por Infanoj komenciĝis dum Februaro: 5 knabinoj, kiuj nuntempe studas en Altgradaj Lernejoj, ankoraŭ daŭrigas sian Esperantan studadon sabate. Unu knabino deziras akiri la "Insignon por Interpretado" por Skoltino. Nova klaso, instruata de f-ino Longson, estas por pli junaj lernantoj —naujaraj infanoj.—A. B. Sedgley.

● **ADELAIDE:** La W.E.A. Esperanto-Klubo komencis la jarlaboron en Februaro. Ĉe la unua kunveno S-ro Hamant paroladis pri sia tri-monata vojaĝo per aŭtomobilo tra Viktorio kaj N.S.W. Ni ĝuis tre interesan vesperon, sidante sub plafon-ventumilo pro la varmega vetero. Je 25 Marto ni invitis ĉiujn Esperantistojn al nia klubĉambro por renkonti Ges-rojn Rutland el Sidnejo. Dum la foresto de la ĝen. sek. de W.E.A. en Anglujo, S-ro Rutland faros lian laboron. Viglan paroladon pri siaj spertoj en Eŭropo kaj aliaj mondpartoj donis nia malnova s-ano, kaj li interesiĝis ĉiujn. Multaj demandoj sekvis kaj nur malfacile mi povis interrompi kaj proponi teon.

Vintra klaso por novaj studentoj komenciĝis (1 Aprilo) kaj kelkaj progresintoj daŭros kun la dua kurso.

Mia lastjara plano donaci E-librojn al la Publika Biblioteko sukcesis ĝis 40 libroj. Preskaŭ triono el la kolekto havis paperajn kovrilojn aŭ estis malnovaj, sed neniu ne povas ne admiri la bindaĵojn el malhelverda tolaĵo kaj oran literaĵon, kiun la biblioteko senpage metis sur ilin. Certe posedintoj ne rekonus siajn librojn. Ni ankoraŭ bezonas kelkajn librojn por akiri propran breton sub la nomo "Esperanto." Ironie ni lokiĝas nun apud "Basic English." Iu intereso kaŝe jam "prunteprenis" "Nelson's E-Course", kaj mi admiras lian guston. Eble li ne povis aĉeti lernlibron en butikoj kaj ne aŭdis pri A.E.A. libroservo. La biblioteko aĉetis novan libron kaj ni esperas ke li (aŭ ŝi) esperantiĝos kaj repagos la movadon pro tiu peko. Mi speciale deziras danki Ges-rojn Hanks kaj s-inon Koppel pro ilia helpo en ĉi-tiu projekto.—W. Addis.

La jara ĝenerala kunveno de la Adelaide E-Societo okazis dum Marto kaj estis reelektitaj Prez. Downing kaj Sekretariino Grace Barlow. Kiel Vicprezidanton oni elektis s-ron Schindler, kies entuziasmo kaj helpemo bone efikis niajn aktivecojn. Ni

ankaŭ bonvenigis la jenajn novajn membrojn: S-inojn Telfer, Chewings kaj Barrett kaj f-inon Hope Cramp-ton, M.A., lektorino de la franca lingvo ĉe la Adelaide Universitato. Tiuj estis anoj de la ĉiusemajna klaso de la societo kaj lernis E-on dum la pasinta jaro. Alia membro estas Kolonelo David Fulton. Oni hezitas nomi lin "nova membro", ĉar dum multaj jaroj li ligiĝis kun la movado, kaj povas rememorigi nin pri la grandiozaj tagoj de E-o en Adelaide kiam ni eĉ antaŭis la aliajn ĉefurbojn. La jara raporto de la sekretariino mon-tris ke la membraro duobligis en 1952 kaj ni esperas eĉ pligrandigi la anonon ĉi-jare.

Dum la marta kunveno ni vidis la belan filmon pri Novzelando, sendita al ni pere de la Canberra Societo, al kiu ni elkore dankas. Ĉi-tiu filmo estas pruntinda, kaj ni skribis al la Altkomisaro de Novzelando por danki kaj gratuli lian registaron.

Kol. Fulton invitis la Societon pik-niki ĉe lia monteta domo dum Aprilo kaj ni ĝoje anticipas tiun tagon.

—Grace Barlow.

● **CANBERRA:** Esperantistoj el Cooma (s-anoj Hunold, Hamisch kaj Mueller) estis gastoj de nia klubo dum Februaro. Ili loĝis kun mem-broj de nia klubo kaj ni kune faris ekskursojn al la pinto de "Ruĝa Monteto", al la rivero Cotter kaj al la Parlamentejo, kie gvidis nin s-ro Loof, nuntempe helpsekretario en la Senato, kaj antaŭa 'Anoncisto kun la Nigra Bastono' (Usher of the Black Rod). Ni vidis la Ĉambregon de la Senato kaj de la Re prezentantoj, la Kabinetan Ĉambron, kaj la Biblio-tekton (kie ni eltrovis E-vortaron). Gojigis nin le ni povis fari taŭgajn aranĝojn, kiuj estos precedencoj por aliaj vizitoj aŭ kongresoj.

La jarkunveno okazis 19 Feb. Pli ol 30 personoj lernis la lingvon en 3 kursoj el kiuj 14 fariĝis membroj de la klubo (kaj de A.E.A.). Oni elektis la sekvantan komitatton: Prez: s-ro H. Torr; Vicprez: s-ro R. Harry; Sekre-tario: s-ro N. Gamble; Kasistino: s-ino H. Torr; Bibliotekisto: s-ro S. Fulop; Kaskontrolisto: s-ro C. Johns. Plej grava agado dum la jaro estis la traduko de la "Carto de UNO" de s-ro Harry. La unuaj 200 binditaj ekzempleroj de la traduko jam dis-sendiĝis tutmonde. Detala raporto

pri nia jarkunveno, verkita de la nova sekretario, publikigis en "Canberra Times".

Ni bedaŭras anonci, ke la ĝisnuna sekretariino, s-ino Maybee, en kies hejmo fondiĝis nia klubo, forlasos baldaŭ Aŭstralion. En ŝi la aŭstralia movado perdas treege aktivan kun-batalanton!

Nova kurso komenciĝis kun 9 lern-antojn, inter ili 3 instruistinoj de la knabina lernejo. Ĉiuj fariĝis anoj de AEA. Kurso por progresintoj okazos ĉe s-ro Torr kaj s-ro Fulop instruas junulojn ĉe la katolika klubo. Lau raportoj de s-roj R. Harry kaj N. Gamble.)

● **SYDNEY:** Dun januaro, nia tre estimata samideano s-ro Chandler grave malsaniĝis. Ni bedaŭras raport-ke, kvankam lia sanstato pliboniĝas, li devas malpliigi siajn laborkampojn. Principe, li ne estas permesata labori kaj tage kaj nokte. Pro tio, li estos kun ni nur malofte dum tiu-ĉi jaro, kaj ankaŭ devas ekŝigi de da sekre-taria ofico. Ni ĉiuj bondeziras al li baldaŭan kaj tutan resaniĝon.

Ankaŭ devis ekŝigi nia prezidanto, Bennett, ĉar li nur malofte povas viziti la Klubon. Tamen, li restas fervora Esperantisto, kaj jam planis gvidi kurson pli proksime al sia hejmo. Bonan sukceson, kaj dankon al li pro lia helpema laboro.

En la Jarkunveno, oni elektis la jenan novan komitatton: Prez.: S-ro J. Matasin; Vicprez.: F-ino F. Smith kaj S-ro A. Rudkin; Kas.: S-ino E. Klussendorf; Sek.: F-ino E. Dash; Bibliotek.: F-ino F. Smith; Socia Organiz.: S-ino N. Monckton.

Profesoro Griffith Taylor faris in-teresegegan prelegon (angla-lingve) por nia marta socia vespero. Kun streĉa intereso ni ĉiuj sekvis lin dum li gvidis nin laŭ la vojo de Kapitano Scott ĝis la Suda Poluso. Helpe de lumbildoj, li kreis memorindan im-preson pri la grandeco, silento, kaj majesto de tiu blanka kontinento.

—E.D.

● **NEWCASTLE:** Nia grupo kun-venas regule. Ĉiun 2-an sabaton en la monato ni kunvenas en la hejmo de s-ino Longworth, kiu estas grava membro de la loka U.N.O.-Asocio. De la 3-a ĝis la 4-a ni diskutas U.N.O.-aferojn kaj de la 4-a ĝis la 5-a ni lernas E-on. Ĉiun 4-an sabaton en la monato inter la 3-a kaj 5-a ni

kunvenas en mia hejmo, kiam ni nur diskutas pri E-aferoj. Meznombro ĉeestas 12 personoj. Poste en la jaro ni planas organizi ekspozicion kaj esperas akiri novajn membrojn.

—Rees W. Perry.

(Brisbane ne sendis raporton.)

● **MELBOURNE:** Marŝado, aŭ pli ĝuste grimrado, al Mt. Bogong en varmaga vetero estis la temo, 21/1, kiam alparolis nin f-no Amy Godfrey. Multaj estis la malfacilaj kaj suferoj, kiujn ŝi rakontis en sia ne-imatebla kaj amuza stilo, dum per mapo ŝi montris la vojon. Belega pejzaĝo survoje abunde rekompencis la penojn, ŝi asertis. La E-movado en Nederlando provizis materialon por interesa parolado de s-ro Leerveld (4/2) ampleksan bildon oni ricevis kaj aŭskultante la viglan, energian kaj decidan elparolon de ĉi-tiu s-ano, oni povis kompreni kial la tiea movado estas tiel forta. Sajne neelĉerpebla, nia scifonto, D-ro Fridenbergs (11/2) provizis interesan paroladon pri "Mensogoj", studo pri trompajoj en la ĉiutaga vivo, en la aferoj de la Ŝtato, kaj en internaciaj sferoj: Ĉe la jara kunveno elektigis la jena komitato: Prez: s-ro McKenzie; Vicprez: s-ro Drummond kaj D-ro Fridenbergs; Sekr: s-ro Cohen; Bibliotekisto: s-no Hill; Komitato: ges-roj Leerveld, s-ro Koppel, s-ro Burstejn.

Adiaŭa festo (18/3) je honoro de F-ino Lorna Samblebe, kiu forveturis por partopreni la 38an U.E. Kongreson en Zagreb, elvokis multajn paroladetojn. Adiaŭon kaj bondezirojn parolis Prez. McKenzie, kaj Vicprez. Drummond; konsilon kaj kuraĝon donis S-ro Frank Halls reveninte el Eŭropo (al kiu bonvenon); reprezentis la virinojn S-ino Hintze; salutleterojn por la Kongreso kaj transmaraj Kluboj transdonis S-ro Linton, A.E.A. Prez., kaj du surprizojn rezervis ĝis lastmomento S-ro Koppel—(1) prezentleteron de la Aŭstralia Ĉefministro kun salutojn de Aŭstralio al la Kongreso; (2) informon, ke E-lingva filmo por montri transmare atendos ŝin ĉe Aŭstralia House en Londono, Dankeme respondis la vojaĝonto.

Allogo al la venonta Kongreso en Perth estis la celo de programo (18/2) kiun prezentis ges-roj Koppel. Informon pri kongres-arangoj, loĝejoj kaj vojaĝkostoj donis unue s-ro Koppel. Sekvis alparolo de s-ino Kop-

pel, kiu kun helpo de mapoj priskribis vojaĝon de Adelaide al Perth, la belan situacion kaj ĉirkaŭaĵon de la kongresurbo kaj ĝuindaj renkontoj kun tieaj s-anoj dum ferio en 1947. Konkursito kun premio, temante pri la vortoj "Perth-Kongreso", plue distris ĉeestantojn, kaj je la fino s-ro Koppel disdonis broŝurojn pri Perth kaj la bela moderna trajno, kiu veturas survoje.

RENDEVUO.—Ĉe la Januara kunveno, kvankam vizito al Mount Bogong estis denove la temo, rakonto de S-ro Ling multe malsimilis al tiu de F-ino Godfrey, ĉar vintro estis la sezono, kiam li gvidis tien aron da skoltoj. Tamen ankaŭ amuzaj estis kelkaj iliaj spertoj, kaj belegaj la neĝaj pejzaĝoj, kiujn li montris. Ĉe la Februaro kunveno, S-ro Leerveld faris pensinstigan paroladon pri Ateismo. Ateisto li asertas estas homo, kiu kuraĝas diri "Mi ne scias." Religiuo nur kaŝas sian nescion en mistero.—F.K.

Tre efikan propagandon faris nia amiko s-ro E. Crowe, kiu publikigis artikolon en "The Locomotive Journal", la oficiala gazeto de la Sindikato de Aŭstraliaj Lokomotivestoj. Li priskribis la organizon de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj, la ĝisnunajn IFEF-kongresojn kaj finis per alvoko al la kolegoj lerni E-on kaj kontakti samfakanojn transmare.

OPINIOJ

"LA RONDO", ĉiam en stato de sana optimismo, deĵoras sen emo al laciĝo, kiel oficiala organo de la aŭstralia asocio, kiu en ĵus sendita depeŝo anoncas la viziton al nia lando de tiea samideano. (Aludas al vizito de nia Frank Halls). La hispanaj grupoj multe ĝojos aŭdante lin persone; pri tio ne ekzistas dubo. Intertempe, speciala plezuro estas la legado de tiu malproksima gazeto, kiu aspektas kiel bela albumo pro la varia kaj ege interesa materialo, tra dense provizitaj paĝoj.

(El artikolo en "Boletin," interesa organo de Hispana Esperantista Federacio.)

★ ★ ★

Mi devas mencii ke "LA RONDO" estas bone redaktata kaj la enhavo sufiĉe varia kaj tre interesa. Ĝi al-

logas al legado eĉ lacajn okulojn post peza dumtaga laboro. Mi sincere gratulas vin pro la granda laboro kiun vi dediĉas al la movado.

(El letero de bulgara s-ano Vlado Koseff, Overland Corner, S.A.)



Frank Halls Raportas

Vera samideana bonveno atendis Frank Halls en Aŭstrio. Post vizito al la Zamenhof-Monumento en Woergl (Tirolo), li iris al la urbeto Saalfelden, kie li montris filmojn en la loka lernejo. Sekve de tiu-ĉi parolado 8 infanoj aliĝis al kurso. Post tre kora akcepto en Klagenfurt, la ĉefurbo de Karintio, Frank prelegis en Knittelfeld (Stirio). Kvankam nur urbeto kun 13,000 enloĝantoj, la Esperantogrupo havas pli ol 70 membrojn. Krome, Advokato D-ro Halbedl instruas Esperanton kvarfoje semajne al 50 knaboj en la loka alternejo.

En Vieno, en granda satono de la Naturamika Domo, Frank Halls montris dufoje filmojn. La urbestro de Vieno, s-ano Franz Jonas, multjara aktiva E-isto, akceptis lin en privata aŭdienco. Kutime akceptoj ĉe la viena urbestro daŭras nur 15 minutojn, sed al Frank li disponigis kvardek. Li disponigis ankaŭ urban aŭtomobilon, kun gvidanto, por viziti diversajn infan-zorgejojn, kaj ĉe la adiaŭo dediĉis belegan bildlibron pri Vieno al la vizitanto. Kelkaj tagoj poste en Graz, la stiria ĉefurbo, filmoj pri Aŭstralio estis la ĉefa programero dum la "Stiria Esperanto-Tago".

La eniro en Jugoslavion estis malagrabla. Ĉe la landlimo 3 doganistoj traserĉis la aŭtomobilon kaj oni intervjuaciis Frank dum tri horoj en la ĉefdoganejo en Maribor. Malbona, do, estis la unua impreso pri Jugoslavio, sed tiu tuj ŝanĝiĝis kiam Frank ricevis varman bonvenigan akcepton ĉe la Esperantistoj de Varazdin kaj Zagreb. Speciale en Zagreb la movado estas treege forta. La loka klubo havas 250 membrojn kaj triĉambran klubojn en la urbcentro, ĉiutage

malferma. Krom prelego en tiu klub-ejo, la loka U.E.A. delegito ankaŭ aranĝis prelegon antaŭ 300 tramistoj kaj intervjuon ĉe la Radio. En Belgrado Frank prelegis antaŭ 150 ĉes-tantoj. Aliaj sukcesaj prelegoj okazis i.a. en Sarajevo kaj Split.

Forlasante Jugoslavion Frank alvenis en bela Trieste kie li trovis tre aktivan E-grupon. En Norda Italujo, unu el la plej aktivaj grupoj ŝajnas esti tiu de Bologna, sub la gvidado de D-ro Nanni. Tiu-ĉi entuziasma s-ano eĉ ne hezitas veturi 49 mejlojn dufoje semajne por gvidi kursojn en Ravenna.

Ne tiel aktivaj estas la grupoj en Suda Italujo kaj nur "vegetas" la movado en Romo, Napoli kaj Bari.

Veturante denove norden, Frank atingis la urbon Parma. Kvankam nur mezgranda urbo, ĝi havas tre fortan E-klubon, kies ĉefspirito estas Profeso Canuto, Prez. de la Itala Esperanto - Federacio. Oni gvidas kurson tie kun 60 partoprenantoj. Ili atente aŭskultis la samideanon el la kvina kontinento kaj Prof. Canuto varme dankis pro la bonega prelego. Sekvis du grandaj filmprelegoj en Milano kaj Genovo.

En Suda Francujo plej elstara E-grupo estas tiu en Perpignan, kies Prezidanto estas s-ano Llech-Walter. Tiu entuziasma s-ano veturas ĉiusemajne al Montpellier por gvidi kurson tie, entute 210-mejla vojaĝo en unu tago por servi Esperanton!

Dum rapida sep-taga vojaĝo tra Norda Hispanujo (Barcelona, Tarragona, Zaragoza, San Sebastian), Frank konstatis ke la tiea movado estas en lertaj manoj kaj daŭre progresas, spite de la malfacila situacio en tiu lando nuntempe.

En Parizo Frank restis tri tagojn kaj montris filmojn al 100 s-anoj. Sekvis rapidaj vizitoj al la landetoj Luksemburgo kaj Saarlando.

La 15-an de Marto, nia "mondvojaĝanto" revenis Melburnon, kore bonvenigita de la anoj de la Melburna E-Klubo. La Aŭstria E-Asocio sukcesis aranĝi por li tri radio-intervjuojn: ĉe 3AW, en la programo "Ni la Popolo", ĉe 3KZ en la programo "Voĉo de la Vojaĝanto" kaj ĉe la A.B.C.-stacio 3LO en la programo "Semajna Jurnalo". Ĉiuj tri programoj estas treege popularaj kaj

sekve de tiuj-ĉi intervjuoj konstante kreskas la porkomencanta kurso de la Melburna E-klubo.

Lingvaj Problemoj

PRI 'DESAPONTI'

("Rondo," p. 95.) Mi ne havas fortan senton por aŭ kontraŭ ĉi tiu radiko. Tamen estas malfacile esprimi la ideon sen ĉirkaŭfrazo. Fuŝi, fuŝigi, apenaŭ sufiĉas. "Miaj esperoj trompigis" eble pli ĝuste ĝin esprimas. Sed tro longe. Mi persone vidis la vortojn skribitajn de Zamenhof en Albumo, cititajn sur p. 556 de "Originala Verkaro", kie trifoj li uzis la radikon desapont— Sed neniu povas diri kun certeco, ĉu tie li ĝin uzis ŝerce aŭ serioze. Mi tamen konfesas, ke ĝi ŝajnas utila.—M. C. Butler.

PETROLO K.C.

NAFTO estas natura fluaĵo, el kiu oni ekstraktas petrolon. PETROLO estas uzata por lumigado kaj hejtado. BENZINO, pli ekflamiĝebla ol petrolo, estas uzata por funkciigi motorojn. BENZENO estas el gudro kaj uzata por forigi grasmakulojn. Miksita kun tolueno, ĝi estas uzata por lumig- kaj hejtado, kaj nomiĝas BENZOLO.

Verax kaj Kabe egaligas benzeno kaj benzino. En la kemio la benz-derivajoj estas multaj.

PARAFINO estas vaksosimila substanco, por lumigado, medicino k.c. Iufoje oni nestrikte uzas la vorton por parafinoleo (Millidge).

Konsilinde estas, uzi nafto, petrolo aŭ petrolo (F. kaj L.) por la oleo en ĝiaj pli krudaj statoj; benzino (aŭ motorpetrolo) por la oleo preta por uzi ĉe motoroj; parafino por la vak-seca substanco, kaj parafinoleo por la fluido.

Por pure teknika verko oni bezonus tre detalan kaj science faritan terminaron. La oktan-fluido postulus apartan pritrakton de fakuloj. La rimarkoj en tiu ĉi serio estas nur sugestaj kaj indikaj.—F.R.B.

KORESPONDU

S-ro Fulop de nia Canberra Klubo avizas, ke post anonco en "Esperanto" li ricevis tiom da korespondpetoj, ke li mem ne povas respondi al ĉiuj. Kontraŭ reafanko li volonte sendos

adresojn de eksterlandaj E-istoj. Petu detalojn de: S. Fulop, 6/10th St., Narrabundah, Canberra, A.C.T.

Nederlanda E-isto dez. loĝejon en Aŭstralio. Bv. skribu al: S-ro J. Riksman, van Harmelen-str. 27d; Rotterdam, Nederlando.

Recenzoj

LA ALASKA STAFETO kaj KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ, de F. Omelka. (The Esperanto Publishing Co. Ltd.) 96 paĝoj, bind. Prezo 9/- (aŭstralia). Aĉetebla ĉe A.E.A. libroservo.

Ĉi tiuj du rakontoj jam aperis kiel felietonoj en "Esperanto", la U.E.A. Revuo, kaj estis originale verkita Esperantlingve. Ili estas nun prezentitaj en unu volumo de plaĉa aspekto, sur bonkvalita papero. Lingvo-uzo kaj preso konformas al la alta nivelo kutima ĉe la nomita eldonejo.

La aŭtoro utiligas kiel krudmaterialon, temojn el la reala vivo, kaj elektas aventurojn en kiuj homoj streĉas ĉiujn siajn fortojn batalante kontraŭ la plej sovaĝaj naturfortoj—ventego, malvarmego, malsato—riskante la propran vivon por helpi al kunhomoj. En la unua rakonto la celo de la strebado estas alporti kontraŭ-diferian seron al vilaĝo, distanca je multe da neĝkovritaj kilometroj, kie epidemio atakis la infanojn, kaj kien aeroplano ne povis iri pro la veterkondiĉoj. La dua temas pri la aventuroj de viro kiu, surzita por savi la vivon de false akuzita amiko, spertis frakasigon de la aviadilo.

La simpla vigla stilo de la verko konvenas por la heroaj faroj rakontitaj, kaj la rezulto estas libro facile legebla kaj tre interesa.—I.P.H.

LA ĈARTO DE U.N.

E-a traduko de L. R. Harry. Multobligita, prepare al eventuala presiĝo, ĝi bezonas revizion. La refleksivo kaj adverba participo ne estas ĉiam ĝuste uzitaj. ". . . la metodo de elekto . . ." ne bone impresas.

Saĝe estus, peti helpon de kompetentuloj en la celo doni al tiu gravega Artikolaro perfekte fidelan kaj klarsencan tradukon. Kie la

Angla teksto povus ŝajni duba, oni konsultu la oficialajn tradukojn en la ceteraj lingvoj.—F.R.B.

“TROJLO KAJ KRESIDA”

William Shakespeare: proze tradukita de Stephen Andrew. Eld. de The Esperanto Publishing Co. Ltd. Prezo 3/6 Aŭst. ĉe A.E.A. Libroservo.

S-ro Andrew konsciencie plenumis intense cerbumigan taskon, tekstfidele farinte el iom teda teatraĵo mirinde flukompreneblan legajon.

Supozinde, tradukanto de la Sekspiraj verkoj en sian nacilingvon ne penas speguli la arkaikan stilon kaj vortuzon—ne esploras inter la malnoviginta lingvaĵo de sia antaŭtrijarcenta idiomo—sed, uzante dignan lingvaĵon de la nuno, celas al fidela redono de la senco kaj formo de la Angla originalo. Por Angla simplulo de la hodiaŭo la afero staras alie; ankoraŭ ne aperis modernigita teksto de la verkaro. La Elizabet-epokaj literaturajoj estas por li iomgrande nekompreneblaj, ĉar ili kreigis en lingvo kaj tempo multisignife diferencaj ol la nuna. Por retro-vojaĝi en la pensmondon de tiu periodo li devas utiligi al si la kribritan reserĉon de 300 jaroj.

En la recenzataĵo ĉiu vorto kaj frazo estas facile komprenebla per si mem, ĉar la arkaika donis lokon al la flulinia sen troa perdo de la parolsonoro konforma kun la medio. Tamen ankoraŭ restas enigmoj aŭ dubaĵoj—paragrafoj, kie cerblace oni penas interpreti al si la pensfluojn, fantaziojn kaj pajace strangan humuron de la roluloj. En tio povas helpi la fakuloj. Tradukanto ne rajtas ŝanĝi aŭ aldoni je sencnebula teksto, kie li opinias necese por la kompreno. Laŭ Zamenhof: “. . . kelkaj legantoj plendos, ke multajn lokojn en mia traduko de la Psalmoj ili ne komprenas . . . se ili volas legi ion ‘tre facile kompreneblan’, ili ne legu la Psalmojn. Ni donas nur tradukon, sed ne komenton, kaj mi ne povas permesi al mi arbitre ŝanĝi la tekston.”

Al “Digest-” franduloj ne plaĉos la verkoj de Sekspiro, kiuj postulas pli da mensa streĉo ol noveloj de O. Henry, Ĉehov, De Maupassant. Leginte kaj printinte ĉi-tradukon sen halto, oni profite relegus ĝin, kon-

sultante komentariojn en la patra lingvo.

La malfacilo por neinstruitoj ne kuŝas entute en la arkaika esprimformo. Ankaŭ la riĉo da aludoj mitologiaj kaj historiaj, kaj la ofte sence-maskita, rebusa naturo de la lingvaĵo, spitas la fortojn de la serioza studanto. Jen mistero:—Kiel simplaj Angloj le la 16a jarcento, laŭ nia kriterio apenaŭ ne analfabetaj, povis plenguste kaj ĝudance ricevi la artglorajojn de la Poet-Majstro, kun ŝato kaj taksipovo nekompare pli vivaj ol la hodiaŭaj.

Tie-tie Andrew, per ritmaj devioj for de la ĉiutageca vortordo, celas adapti la parolformon al la scenejaĵo. “. . . ŝvite mi penas por i trovi bonajn . . .”; “. . . songo mia por vi antaŭdiras—on.”

Entute li reduktis cerbumigon ĝis plejebla nuleco, laŭ propra pretendo. En la Prologo, kiun Esperante oni facile komprenas, naŭ el dek Angla-lingvanoj stumblus kontraŭ “orgulous”, “immures”, “fraughtage”, “vaunt and firstlings of the broils”. Kiu el ni povus kontentige parafrazi la Prologon en modernan ritmajon, ne uzante alian libron?

I'll hide my silver beard in a gold beaver,

And in my vantbrace put this wither'd brawn . . .

(. . . arĝentan barbon mian kaŝos; ĉi tiun brakon jam ŝrumpitan mi en mian fermanikon metos . . .)

Jes, la klareco estas mirinda.

La prezo estas malalta, la papero kaj presado bonegaj, kaj preseraroj preskaŭ tute mankas. P. 94: Ĉe (Ĉu).—F. R. Banham.

U.E.A.—JARLIBRO 1953: 1-A PARTO

Trajtoj de la Jarlibro, kiuj sendube trafos la aprobon de uzantoj, estas: Frua apero, Listo de E-istaj Arangoj en 1953. Tio, kun la konataj listoj de delegitoj, gazetoj, eldonejoj kaj novaperinta literaturo nia, faras ĉi tiun libron nepre havinda konsultverko por ĉiu serioza E-isto. Neaĉetebla, nur por Individuaj Membroj de UEA. Alĝiloj de la Aŭstralia Ĉeferanto L. Pfahl, 37 Seymour St., Croyden Pk., N.S.W. (Dum 1952, UEA havis 16185 membrojn, 181 en Aŭstralio).

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

Vol. 11, N-ro 57.

MELBURNO.

Majo - Junio, 1953.

INFORMING THE CONVENTIONAL ENQUIRER

How's Esperanto Doing These DAYS?

Almost inevitably you hear it whenever Esperanto is mentioned. How do you, presumed to be the knowing one, give answer? Your reply is probably conditioned by your mood of the moment. With seemingly graver things on your mind you may tend to let the subject fade into another via a few remarks suggesting that "things are pretty fair, encouragingly."

When, however, the tone is high, you have come from, say, the vibrant

stimulus of a rich and varied foreign mail, with pep and poise you address your questioner thus: "Look, friend, you may not know it, but it's a very remarkable thing that a planned language ("artificial" to you) is in existence to-day nearly 70 years after it made its appearance. No other project has lived anything like so long. It has survived two world wars. The global depression, several more localised varieties of currency shake-ups that drew the cash from Esperantists' pockets and palsied their organisation, and the distrust and dislike of certain circles plus the inertia of the mass.

**THE ESPERANTISTS OF WESTERN AUSTRALIA
EXPECT YOU FOR A GLORIOUS CONGRESS!**

Mail your Congress Fee (25/-) now and reserve your accommodation.

Address all enquiries to Miss O. Stempel, 96 Blencowe Street,
West Leederville, W.A.

It has lived through years in the catacombs of Spain and Portugal, where it is now restored, with admonitory finger-wagging by those indulgent governments, and now, for some time, as if to show that politics has nothing to do with it, it has suffered the same under rulers markedly rude to the Latin dictators. In East Europe, e.g., it has been "re-organised" out of any semblance of international activity. Deprived of free postal service and seldom meeting a foreigner, where can these spiritual and, alas, ageing cut-offs find fuel for faith, and incentive to hold on, if not in their memory of the Zamenhof ideal and the belief that outside their frontiers the movement really moves forward? But what inducements have the young to learn Esperanto—a rising generation severed from those of similar age abroad?

"Science, once universal, is compelled to conform to the supposed of the earth the light-bringers of a national interests, and over vast tracts of the earth the light-bringers of a wider fraternalism are hindered or suppressed. Had our Mr. F. Halls succeeded in entering Hungary to radiate goodwill, it would have done more to sap these fear-raised barriers than all the ranting of exalted screwballs on both sides of the Curtain.

"Has it ever occurred to you what potentialities Esperanto has? Where can we turn to find anything doing its job? In what language not your own could you write a clear and correct simple letter after a few months' honest application? The tenses of all verbs you can master in a matter of hours; those of a national tongue call for years. After much travail and every amenity, Somerset Maugham mourned his impotence before the Spanish subjunctive. An Esperantist can pen his feelings to a Japanese and feel sure that one voice has penetrated the wall of ideograms that hems in over 80 millions whom to fight is easier than to understand. So with the others."

To your collective ear I now turn from my attentive and—we trust—impressed auditor. If our movement

is to move we must make more of us. Like the conies, we are a feeble folk, feeble also statistically, which they are not. With their numbers we could do things. Keep the PYKE Memorial Examination before the classes you form, the individual you tutor, as an inspiration and incentive towards a set goal. This worthy foundation must not die through lack of publicity.

Use Esperanto. Through your pen and your larynx the word becomes flesh—a witnessing entity. Double your correspondence and resolve to attain fluency. Many years ago a tiny child came from Germany, leaving his parents at home. He was educated in Australia and knew only English. The parents had but the native German. His letters to them he wrote in Esperanto, which they learned in order to reply to him. This old printer was the first Esperantist I knew; and he had something I wanted. Like most things I wanted, I got that too.

—F. R. BANHAM.

READ "EPOKO" BOOKS

Light reading for an idle hour.

1. Murdo en la Orienta Ekspreso (Christie).
 2. La Knaboj de Paŭlo-strato (Molnar).
 3. La Princo kaj Betty (Wodehouse).
 4. La Tempo-Maŝino (H. G. Wells).
 5. Princino de Marso (Burroughs).
 6. Colomba (Merimee).
 7. Sep Vangofrapoj (Aszlanyi).
 8. La Virineto en Bluo (M. Stuttard).
 9. Brulanta Sekreto (Zweig).
 10. Kiso de la Reĝino (Navjivin).
- Nos. 1 to 6 each 3/6.
Nos. 7 to 10 each 5/-.

Published by Ken G. Linton, on behalf of the Editorial Committee of the Australian Esperanto Association (Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne.

De La Prezidanto

Esperantistoj devas marteli sur ĉiu pordo en sia penado disvastigi la internacian lingvon, sed ĉiu konsentus, ke eble la nune plej grava el ĉiuj pordoj estas tiu de UNESKO, la edukada, scienca, kaj kultura sekcio de UN. Pro ĉi tiu grava fakto AEA komisiis S-ron R. L. Harry, de la Canberra Esperanto Club, posteni sur la sojlo ĉe ĉi tiu pordo por persiste trudi la celojn de nia mirinda lingvo.

Diri, ke li fide plenumis la rolon, estus granda maltroigo de la vero. **Efektive mi ja kuragus aserti, ke neniu aŭstraliano pli faris por la movado en tiel mallonga tempo!** Konlatante, ke la prezento de la pet-skrivo subskribita de preskaŭ dek ses milionoj da nomoj estas nia plej potenca armilo. li tiun kaptis por vigne marteli sur la pordo de la Ministro por Eksterlandaj Aferoj, kaj tiu de la Australia Unesko-Komitato en Canberra. Li tiel sukcesis ke la Ministerio invitis A.E.A. fari raporton pri Esperanto en Aŭstralio por sendi al la venonta kunveno de UNESKO.

S-ro Ralph Harry mem entreprenis tiun taskon—jes, taskon, kiu ŝajnis senespera al ĉiu, kiu bone konas nian mankon de arkivoj, sed el preskaŭ nenio li ne nur kompilis brilan raporton, sed en sia letero al la Ministerio por Eksterlandaj Aferoj prezentis tre praktikajn konkretajn facile plenumoblajn proponojn, kiuj estos transdonitaj kun la raporto al UNESKO.

Kopion de ĉi tiu raporto, kune kun la letero al la ministro, devus posedi ĉiu aŭstralia samideano, sed jen estas du tre gravaj paragrafoj el tiu letero, la unua de kiuj prezentas, laŭ mia opinio, la plej gravan parton de lia propono:—

“Estas la espero de la Aŭstralia Esperanto-Asocio, ke fine eblos, ke estu kreita internacia konvencio, per kiu Esperanto estus enkondukata laŭ stadioj en ĉiujn lernejojn ĉe la taŭga nivelo. La Asocio rekonas, tamen, ke eble ne estus praktike por UNESKO krei tian konvencion je la nuna tempo. Kiel tujja programo ni sugestas, ke la Generala Konferenco devus rekonii la valoron de Esperanto

por progresigi la celojn de UNESKO, kaj devus rekomendi al membroŝtatoj, ke tiuj iniciatu ĝian plivastan uzon, precipe per klasoj en preparaj kolegioj por instruistoj. La anoj le tiuj kursoj povus poste partopreni internaciajn seminariojn organizitajn de UNESKO pri sciencaj, kulturaj, kaj edukadaj problemoj, en kiuj la nura uzita lingvo estus Esperanto. UNESKO povus organizi almenaŭ unu kurson jare en Eŭropo, Azio, Ameriko, kaj Afriko. La supra programo plivastigus la scion de Esperanto inter instruistoj, kaj samtempe provizus utilan manifeston pri la valoro de la internacia lingvo por internacia diskuto pri sciencaj, kulturaj, kaj edukadaj problemoj.”

La dua, kiu estas la fina paragrafo de la letero, prezentas la instigan motivon:—

“Mi kredas, ke ĉi tiu demando estos konsiderata de la Aŭstralia Unesko-Komitato inter la 19-a kaj 22-a de Majo, kaj mi estus ĝoja, se kopio de ĉi tiu letero povus esti sendata kune kun la raporto de mia Asocio al ĉiu ano de la Komitato.”

Ni ne nur fervore gratulu nian Komisiiton por Uneskaĵ kaj Eksterlandaj Aferoj, kaj entuziasme laŭdu lian laboron, sed ni kiel eble plej arde imitu la ekzemplon de S-ro Ralph Harry—multaj aliaj fakoj en nia organizo provizas egalan oportunon por agema samideano progresigi nian aferon—kelkajn okupas valoraj ofisistoj de nia Asocio, sed aliaj, mi bedaŭras diri, ankoraŭ vakas.

Via prezidanto,

KEN G. LINTON.

PREMIO MASEL — REGULOJ POR 1953

La Premio estas £A 5 kaj estas por la plej bona literatura verko originala en Esperanto. Al la Premio povos aspiri ĉiuj E-istoj de Aŭstralio kaj Novzelando. La konkurso fermiĝos je 30-a Sept. kaj dum la kongreso ni anoncos la rezultojn. Ankaŭ ni informos la konkursantojn per poŝto pri la rezultoj. La juĝo, sen rajto apelacia, estas en la mano de juĝanto elektita de nia Ligo.

La kandidatoj sendu siajn verkojn titolitajn, sed sennomajn, kaj en aparta koverto, sur kiu ili skribu la titolon, ili metu nomon kaj adreson de la aŭtoro. Estas konsilinde ke

aŭtoroj konservu kopion. Verkoj devas esti en prozo, prefere maŝinskribitaj (kun interlinia spaco, aŭ tre klare manskribitaj. Se eble, ni publikigos la sukcesan verkon en E-gazeto. Se nur unu verko estos ricevata, la sekretario nuligos la konkurson por ĉi-tiu jaro, sed konservos ĝin por la venontjara konkurso. Neniu E-isto, kiu jam gajnis la Premion dufoje, povos partopreni.

La verko devos esti inter 1000 kaj 1500 vortoj. (Adreso: Jack Hawks, 56 Norwood Rd., Rivervale, W.A.)

Australia Kroniko

● **PERTH:** Sukcesa societa kunveno okazis en la Ligo dum Marto kiam s-ro Hawks parolis pri "Du Montaj Pintoj" kaj faris tre interesan paroladon pri Mt. Kosciusko kaj Ben Nevis, kiujn ambaŭ li grimpis. Vigla diskuto sekvis lian paroladon. Tre bona propagando fariĝis lastatempe per leteroj en la plej grava tagjurnalo "West Australian", kiu presis 3 leterojn de Liganoj kaj aperis ankaŭ alia subtenanta letero, tre favora al Esperanto, de iu kiun neniu en la Ligo konas.

Ciun monaton la Direktanto de Propagando en la Ligo sendas raporton al s-ino Baesjou en Mt. Barker, W.A., kiu el ĝi faras rondleteron por la kamparaj anoj. Ŝi raportas ke per ĉi-tiu letero la intereso en la afero kreskas; multaj skribas entuziasmajn leterojn al ŝi, dirante ke ili nun ne sentas sin tiel izolitaj.—O. Stempel.

LASTMOMENTA NOVAĴO: Laŭ ĵus ricevita raporto aliĝis jam 40 anoj al la Perta Kongreso. Detala listo sekvos venontnumere.

● **ADELAIDE:** Lastatempe okazis kelkaj esperigaj signoj en la movado en Adelaide. La nova WEA sekretario kaj lia edzino, ges-roj Rutland, alportis ĉi tien vivan atestaron pri la praktika utileco de E-o en multaj mondpartoj. Dum Marto s-ro Rutland priparolis al la Adelaide Societo kaj aliaj vizitantoj pri siaj mondvojaĝoj pere de Esperanto, kaj ni multe inspiriĝis pro tio. Lia subteno sendube plifortigos la laboron en la WEA ĉi tie. La Societo sendis grandan pakadon da infan-desegnaĵoj al

Svedujo, kie la Sveda Laborista E-Asocio organizas ekspozicion. La temo estas: "Laboro kaj festo en mia hejmlando."

Kelkaj membroj ĉeestis tre agrablajn piknikojn ĉe Aldgate dum Aprilo. Ni kunvenis ĉe Kolonelo Fulton kies revenon en la movadon mi multe bonvenigas. Speciale agrabla estis la ĉeesto de s-ino O. Glenie kiu tiutempe vizitis Adelaide el Melburno.

Dum Majo ni ĝuis tre agrablajn filmvesperojn de s-ro Kolonelo Fulton, kiu montris filmojn pri sia veturado en Centra Aŭstralio. S-ro Kollosche pruntedonis sian aparaton kaj tre bonkore funkciigis ĝin, dum Kol. Fulton faris E-klarigojn. Nova klaso komenciĝis ĉe Woodlands Knabina Anglikana Lernejo kaj ni ĝojas raporti kelkajn lernantinojn el la pasintjaraj klasoj ankoraŭ entuziasme korespondas kun geknaboj en Hispanujo, Germanujo, Pollando kaj Italio.

—Grace Barlow.

● **DEVENPORT (Tas.):** Bonan propagadon faris lastatempe angla enmigrinto, s-ro A. Fisher, iama prezidanto de la Bournemouth E-Klubo. Li prelegis en la "Rotary Club" kaj en la "Church of England Men's Society" pri nia lingvo ĝenerale. Kelkaj ĉeestintoj esprimis la deziron lerni la lingvon, do kun helpo de nia membro s-ano Charles Ramsay li komencis kurson en la "Adult Education Centre" kiun partoprenas 10 komencantoj kaj s-ino Kirkwood el Latrobe, kiu lernis E-on antaŭ jaroj en Melburno, kaj tre entuziasmas pri la okazo praktiki la lingvon denove.

● **CANBERRA:** Dum Marto, la membroj kiuj ĉeestis la monatan kunvenon aŭskultis legadon de teatraĵeto "Taso da Teo", kiu gajnis la unuan premion ĉe la Oslo-kongreso. La legantoj estis s-ino Torr kaj s-ro, Harry kaj Fulop. Antaŭ la legado de la teatraĵeto oni ankaŭ laŭlegis leteron de s-ano Frank Halls pri ties eŭropa vojaĝo. Nomo de la membroj, nia vic-prezidanto s-ro R. Harry adiaŭis s-inon Maybee, kiu dum Aprilo revojaĝus hejmen al Kanado. (Ŝia edzo estis ano de la stabo de la kanada altkomisaro en Aŭstralio) Bonvenaj vizitantoj al la klubo dum Pasko estis ges-roj F. V. Taylor el Albury.

Dum Aprilo kvara klaso komenciĝis ĉe la Kanbra Anglikana Gimnazio

por Knaboj. Tri instruistinoj de la Kanbra Anglikana Gimnazio por Knabinoj ankoraŭ partoprenas unuigradan klason ĉe la Suda Flanko de la urbo, al kiu venas ankaŭ lernantoj el apuda Queenbeyan, kaj eĉ unu el Goulbourn, 60 mejlojn for! Kvar s-anoj el Cooma, 70 mejlojn sude de Canberra, aliĝis al nia klubo kaj pere de ĝi al AEA, unu el ili aliĝis ankaŭ al UEA. Ĉe la Norda Flanko de Canberra, la klaso de progresintoj bone progresas. Sed la plej grava decido estis aranĝi E-ekspozicion dum Junio. Ni jam ricevis multajn Esperantaĵojn el diversaj partoj de la mondo kaj deziras ankaŭ utiligi kelkajn desegnaĵojn el la infan-ekspozicio montrita antaŭ 2 jaroj en Sid-ejo.—Harry Torr.

● **SYDNEY:** Vizitis nin en la komenco de Aprilo, S-ro Latimer, bone konata Esperantisto nun dejoranta en Nowra. Je tasoj da kafo en loka ejo, ni deziris unu al aliaj bonan Paskon, kaj samtempe scivoligis la aliajn kafejulojn per kaj pri nia lingvo.

Samvespere ĉeestis S-ro Chandler, kiu multe pli bone sanas nun. Nur, li devas sciigi al nov-konatoj, kial li sanĉeligi marŝas!

Ni volas gratuli S-ron Halls de Viktorio pro lia bonega parolado, disaŭdigita de A.B.C. dum "Week-end Magazine". Tiaj entuziasmaj kaj sinceraĵaj vortoj de homo juz spertinta la praktikan uzadon de la lingvo tra Eŭropo, certe bone impresis multajn.

S-ino Worcester, vizitantino el Londono, paŭzante survoje hejmen laŭ Sud-Afriko, tre interese parolis al ni pri siaj spertoj survojaj kaj Mondkongresaj.

Je nia Socia Vespero, oni vidis Sinjorinon Worcester aspekti tre surprizite. Jus estis envenanta F-ino Dash—ili renkontis unu la alian antaŭ kelkaj monatoj en Oslo.

La programo de tiu-ĉi vespero estis, por la vizitantino kaj ni ĉiuj, tre interesa, ĉar ni vidis lumbildojn, kiujn faris S-ro Matasin dum aŭto-vagado al Kvinlando. Li kaptis, kiel ĉiam, ege vindindajn bildojn de la pejzaĝo, arbaroj, kaj indiĝenaj bestoj.

Gastigis nin en sia hejmo, 8an Majo, S-ino Klussendorf. Dum bongusta vesperrango kaj distra vespero, ni plue ĝuis interparoladon kun S-ino Worcester.

Dum ŝia semajno en Sydney, intervjuistoj de kelkaj radio-stacioj kaj gazetoj intervjuis S-inon Worcester, kiu ekkaptis la okazon por disvastigi scion pri Esperanto.

Tia reklamo estas tre bonvena, ĉar ĝuste en mezo de Majo komenciĝos nova kurso en nia Societo. S-ro P. E. Schwerin gvidos la kurson laŭ la Ĉe-metodo.—E.D.

Brisbane ne sendis raporton.

● **MELBOURNE:** Kortuŝa estis la rakonto de S-ro Burŝtejn (25/3) pri travivaĵoj kiel malliberulo malantaŭ la fera kurteno. Laŭ petoj de intereso li daŭrigis (22/4 kaj 20/5). La 70-a naskiĝtago de S-ino Hintze estis denove okazo por gaja festo ĉe Melburnanoj. Tiu fidela, laborema S-ano mem provizis la programon per kelkaj legajoj, kaj poste agrable surprizigis per festmanĝeto kaj donacoj. F-ino Elsie Godfrey (15/4) recenzis libron, kiu temis pri famaj krimuloj kaj fiuloj.

Informriĉa kaj vera okulfesto estis la filmo, okdekminuta, en belaj naturaj koloroj, farita de Frank Halls en Eŭropo kaj montrita en la Klubejo (29/4). La ekvatoro-transira ceremonio sur la "Strathnaver" provizis amuzan enkondukon. Poste oni okule traveturis preskaŭ la tutan Eŭropon—de Belgio tra Nederlando al Germanujo—tra Danujo kaj Svedujo al Norvegujo—revene al Bavarujo, Svisio, Luksemburgo, Liechtenstein, Aŭstrujo, Jugoslavujo kaj Italujo. Grandegaj urboj intermiksigis kun pitoreskaj vilaĝoj; kaj grandiozaj panoramoj postsekvis belajn kamparajn pejzaĝojn. En Norvegujo oni partoprenis Universalan E-Kongreson kaj boatek-skursis en belega fjordo; en Germanujo oni akompanis procesion al pafesto en loka foiro kaj en alia urbo procesiis al infesto; en Danlando oni ĉe-estis rikolfeston. Interesajn kontrastojn provizis okupataj komercstratoj kun trankvile belaj loĝstratoj en Rotterdam, blankaj alpoj kun verdaj montoj en Svisio, kaj belege blua lago ĉe Lucerno kun monto en Aŭstrujo, tute kovrita de aŭtunfolioj en ĉiu sunsubira koloro. Interesaj historiaj, geografiaj, religiaj kaj aliaj rapide postsekvis unu la alian—mirindaj skulptaĵoj en Norvega parko, militruinaĵoj en Germanujo, mondfama Rejno apud la deveno kaj la fino, Ober-Amergau kun belaj pentra-

joj sur siaj dommuroj, la ursoj de Berne en sia ejo, Zamenhofa monumento en Aŭstrujo, venonta Esperantujo (Zagreb), kanaloj de Venecio kaj multe pli, kun jen kaj jen ride-tantaj, gastamaj kaj laboremaj samideanoj. Kia domago ke filmoj elĉerpiĝis en Italujo! Nur ekvido de tiu lando kaj bedaŭrinde nenio en Hispanujo kaj Francujo estis ebla.

Informo pri nia arĝentriĉa minurbo, Broken Hill, ĉe rando de dezertregiono konsistigis la paroladon de S.-ino P. Hanks (6/5). Treege interesa estis ŝia rakonto pri la tiea batalo kontraŭ sekeco kaj polvoventegoj. La fina sukceso per starigo de ĉirkaŭa verda zono estas daŭra monumento al saĝa botanikisto, Albert Morris, malavaraj ministroj kaj multaj urbferaj civitanoj. Nova parolanto (27/5) estis S.-ino Leerveld el Nederlando. Ŝia rakonto pri la vivo de nederlando pentristo, Van Gogh, estis bone elektita kaj ege interesa. Ni esperu, ke tiu estis nur la unua el multaj tiaj paroladoj. S-ro Koppel kelkfoje donis raporton pri la spertoj de nia U.E.K.-delegito, F.-ino Lorna Samblebe.

RENDEVUO.—Ĉiam interesaj kaj informriĉaj estas la paroladoj de naturamantoj G.-sroj Hanks. Ĉe la Marta kunveno S.-ino P. Hanks priskribis "Du Strangajn Aŭstraliajn Bestojn"—malĝuste nomatajn "Platypus" kaj "Echidna." Specimenoj kaj bildoj aldonis al la intereso. Ĉe la Maja kunveno S-ro E. Hanks priskribis aŭstraliajn serpentojn kaj donis valoran konsilon pri mordkuraco. Ankaŭ li montris specimenojn, kaj per vivŝajna serpento unue trompis kaj poste ridigis la ĉe-stantaron. Iom da dramo en-havis la programo de la Aprila kunveno. S-ro J. Gottlieb legis memtradukitan Biblian rakonton—"Samson kaj Delilah."—F.F.K.

FANTAZIAJO

Mi enreviĝis. Profunde. Pli profunde.

Jen, mian naskiĝon mi ree ĉe-estis. Sed nun mi jam povis vidi, ke naskiĝis en tiu tago ankaŭ mia stelo.

Mia stelo! Tiu stelo, al kiu, mortinte, nepre mi devos iri.

Ne malagrabla afero, tio, laŭ via supozo.

Ho, sed ĉu? Ĉar, en mia revo, mi vidis, ke ĉiu ago mia, ĉu bona, ĉu

malbona, dum mia tuta vivo, tien flugas, surpranante sur si iaspecan formon taŭge konforman.

Mia stelo! Kie la enkorpiĝintaj agoj de mia nuna ĉi-tiea tervivo min avide atendas.

—JOAB ELJOT.

Recenzoj

.LIBERIGO DE TIMO KAJ MIZERO.

Komp. Th. Stillebroer, trad. C. Joon. Eld. Internacia Asocio Bellamy, Koningstr. 188, Bevermijk, Nederlando. 20 p. prezo 0.15 dolaro (2 rspk.).

Jam dum jarcentoj pensemaj homoj serĉis reĉepton por la ideala ŝtato kaj de tempo al tempo aperis verkajo kies aŭtoro firme kredis ke lia elpensajo solvos la problemon. Tiuj planoj diferencis laŭ la stadioj de tutmonda interligeco. Platono elpensis "demokratano" respublikon kiu, tamen, baziĝis sur sklaveco. Sed pli demokratitaj ideoj gajnis teronon dum la paso de la jarcentoj. Inter aliaj, More, Butler, Owen, montris la vojon, kaj en la jaro 1888 usona ĵurnalisto, Edward Bellamy, publikigis sian planon sub la titolo, "Looking Backward" (Rigardante Malantaŭen). Ĝi estis fiktiva historio de homo kiu iel apartiĝis de la konscia mondo en 1887, kaj denove en 2000 vekigis kaj mirigite konstatis la teknikan progreson kaj la ŝanĝojn en la socia ordo kiuj intertempe okazis.

Tiu libro kaj aliaj de Bellamy faris siatempo grandan impreson, sed la ideoj de Marx (pli frue publikigitaj) disvastiĝis kaj donis novan direkton al la socialistaj movadoj. Dum multe da jaroj la ideoj de Bellamy gajnis neniu novan teronon, sed nun la Internacia Asocio Bellamy atentigas la publikon pri ili.

En la ĵus eldonita libreto I.A.B. asertas ke "la hodiaŭa socia sistemo estas el scienca kaj morala vidpunktoj netenebla", kaj insistas ke se oni ne enkondukos la neeviteblajn ŝanĝojn po'ome, la alternativo estos perforta frakaso de la nuna ordo. Ili skizas la principojn laŭ kiuj la mondo devus esti organizita por ke al ĉiu homo estu garantiita la rajto al "socia justeco, spirita libereco, kaj ekonomia egaleco", ĉiuj havu sekurecon "de lulilo ĝis tombo".

Rajtoj estos aŭtomataj, laboro deviga, produktado laŭ bezonoj, kaj ne por profito. Persona libereco estas fundamenta principo kaj ĉiuj havos liberan elekton pri metio. Nu, belaj idealoj! Sed ĉu oni povus konsekvence postuli tiun liberan elekton? Severe regulita produktado implicas ke la estraro devas difini la nombron da laboristoj en ĉiu metio, kaj lokigi ilin laŭ la plej urgaj bezonoj. Multaj aliaj demandoj svarmos en la menso de la leganto!

Laŭ la spertoj de pluraj landoj, multaj homoj jam elreviĝis pri la certeco ke movado "liberiga" nepre liberigos, kaj ne devojiĝos al burokrateco.

Konsentante ke ne la tuta projekto povus esti enkindukita uer unu fojo, A.A.B. donas liston da provizoraj aranĝoj, kaj atentigas ke multe da tiuj jam ekzistas almenaŭ embrie en la nuna sistemo.—I.P.H.

"KVAROPO"

Poemoj: William Auld, John Dinwoodie, John Francis, Reto Rossetti. Antaŭparolo de Gaston Waringhien. Juan R. Perez, eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj. 272 paĝoj, 10 ŝil. (Angle) ĉe niaj agentoj.

Tiu impona kompilo kuraĝige saltigas la koron de ĉiu amiko de nia lingvo. Ĉu aŭ ĉu ne ĝi signas novan ondon de literatura kreemo multe dependas de la subteno ricevota de la larĝanimaj entreprenintoj. Sukceso tre povus sekvigi eldonadon de libroserio tre grava por nia kulturo.

La kvar poetoj, influataj de la genio de Kalocsay, estas Skotoj. Tiu dotita grupo jam de longe ornamis la paĝojn de "Esperanto en Skotlando" per versgemoj, kies polurita artformo tiris vastan atenton.

W. Auld estas socie konscia, homo por kiu la mondo provokas kritikindon. Lia junverva energio pelas lin domaĝi la dormon, kies forto devigas lin perdi horojn en "senfrukta sveno". Proleteme, li lertstrecke pentras la vivaĉon de laboristedzino, el kiu antaŭ longe jam "elĉerpiĝis la larmprovizo." Homo ŝanĝhumorema, li vidas la vivon kiel "karuselon, kun nenia celo"; aliloke li kredas al la progreso, "je nepre venk' iama", ne nur de Esperanto sed ankaŭ de la homa racio entute, tuthomara, solidara.

Kiel socia stimulant, li akre kritikis la religian instituciismon, eĉ la bazajn dogmojn li nomas mitoj. Motivas lin tamen la sentemeco de homo torturata de la propra humaneco. Ĉe versoj randantaj la erotikon, li majstre muldās. Evitante maldecon, li konkretigas la plej subtilajn sensomovojn. Je pli trivialaj temoj li montras amuzan flankon de l'uzado lingva.

Amare li parolas al "la perfdita juno", kiu "savis la mondon por kapitalo"; al sia patrujo li riproĉas pro sinvendo al "la potenc' dolara", sed lia amo al ĝi devigas lin antaŭdiri ĝian rehonoriĝon antaŭ admirantaj popoloj.

Auld, la nekonformulo, spronpikas al socio apatia, morale langora.

La menso de Pastro John Dinwoodie odoras la parfumojn de lia amata ĝardeno. Malgraŭ sia kristana filozofio, li "soifas komprenemon por eksplika la problemon de la celo kaj signifo de la vivo." "En la koro restas duboj", sed birdkanto forvelke ilin pelis. En la poemciklo Dorno kaj Rozoj li bele vestas la pensojn naskiĝintajn per solena promeno en la regento de l'floroj. Kelkverse li lamentas la morton en Afriko de junulo amata. Homo de ekstrema sentemeco pri ĉio nature bela, de religia rezignacio, li defendas la juston de Dio kaj strebas ami la homojn. La Morto, fuŝulo, forrabis la korpon de amiko, sed forgesis rompi la ligilojn de la du animoj. Lia bedaŭro pri rozpetalo falinta en koton, kaj vente frakasita papilio, pensigas pri la Parolo al Muso, de Burns.

Magdalena estas atako vipa al la senkoreco de preĝejaninoj, kies pia forreteniĝo igas ilin moralaj pekuloj antaŭ malĉastulino, senamike mortinta. Per homa tent', ne Dia dekreto, ŝi falis en la abismon. Per homaj manoj ŝi devus esti savita.

Natur-ampleksa, melankolie serena poeto, kies verko inspiras la simpatian leganton, kaj mildigas la ĉikanemon.

La pensmasiveco de John Francis voligas lin preni en la tenon de lia vasta konceptemo ne malpli ol la tutan universon. Liaj strofoj limigas sin nur per la senlimeco—la nasko, evoluo kaj mortofino de la kosmo.

Spiras tra ili la prema sento de l'fatalo, la sensignifo de la homo en turbulenta sed mistere konformigita interludo de sennombraj mondoj jonglataj en la senfina spaco. Malgraŭ ke la homoj, pro formortiĝo de la tero, okupas aliajn loĝeblajn astrojn, fine mortas ankaŭ la suno, kaj "sen-vive sin etendas vakua firmamento." Deprima bildo, ne facile akordigebla kun la piismo, sed iom subtenata de sciencistoj.

Signifa fortostreĉo, komparinda kun iu alia tiuspeca.

* * *

La humurema, Svarceca menso de Reto Rossetti kontentiĝas plejparte kun la facilanimaj, amuzaj. Nur en La Abismo li elpuŝas krimon de l'koro. "Se nur mi havus celon . . . eĉ trompan; nur la trompon mi ne vidu." Tra Verda Lupeo donas Esperantan guston al la verko; la omaĝoj al Kalocsay estas fundiĝo de l'adoro ardanta kaj la tristo larmopreta. "Jam mude kuŝas la septuba fluto."

En firmitenaj manoj levigas alten la torĉo de l'tradicio poeza.—F.R.B.

LA KARNAVALO KAJ LA

SONAMBULINO de K. L. Immermann. Trad. A. E. Wohltat. Epokolibro n-ro 11. prezo 5/- (aŭstralia) ĉe A. E. A. Libro-servo. Eldonis, The Esperanto Publishing Co. Ltd.

Ĉi tiu libro bele konformas al la celo de la Epoko serio, nome provizi la Esperantistaron per bonaj legaĵoj de distra speco. La romano, verkita antaŭ jarcento, prezentas ne nur ekscitajn aventurojn, sed ankaŭ psikologiajn problemojn. La ĉefrolulo, kiu parolas al ni ŝajne laŭ la fluo de la pensoj, kaŝante nenion antaŭ ni, malkovras la fonton de sia ĉiama malsukceso eĉ en cirkonstancoj tre favoraj. Ekzemple, li volis ĉesti teatraĵon kiu estas prezentota de fama artisto. Li decidis ke antaŭ la fiksita horo li devus funde studi la verkon kaj legi ĉion eblan pri la artisto. Horoj perdiĝis dum li serĉis la koncernajn librojn, kaj trovinte ilin li forgesis ĉion alian tiom longe ke li tro malfruis ĉe la teatro.

En la epizodo de la sonambulino li havis tre strangan sperton. Estinte skeptikulo tiurilate, li tamen sub la

influo de virina ĉarmo, konfuziĝis. La rezultoj estis por li kaj lia edzino tre gravaj. Survoje al la fina katastrofo la aŭtoro donas pikan satiron pri du specoj de reformuloj. Unu tre volas rekonstrui la urbon laŭ pasinta modo; la alia, male, pretas irakasi ĉion—krom sia propra domo—en la nomo de progreso.

La stilo de la libro estas facila kaj intima kun ekbriloj de humoro. Estas interese noti el kiom da naciaj literaturaj la Epoko libroj ĉerpas materialon. La plej nova estas la dua el la Germana. Kvin nacioj jam kontribuis al la valora internaciego de la serio.—I.P.H.

NIA LINGVO ESPERANTO, de Karl Vanselow. 36 paĝa, prezo 2 rpk. ĉe la eldonejo, Berliner Esperanto-Verlag, Berlin - Neukolln, Teupitzer Str. 111. Ĉi tiu libreto estas la unua kajero de serio kiu celas provizi la esperantistaron per materialo por kanto kaj deklamo. La simplaj versoj, kiuj fluas glate, estas grandparte esperantaj reverkajoj de konataj kantoj kies melodioj estas signitaj. Sendube tre utila por kantemaj samideanoj.—I.P.H.

KIAL HAZARDLUDI PRI VIA VIVKUNULO?

Se vi estas soleca oni prezentos vin al la por vi plej taŭgaj amikoj. Multaj solencaj geviroj, novaj kaj malnovaj aŭstralianoj kaj transmuloj el ĉiu vivsfere, aĝgrupo kaj religio estas anoj de nia Internacia Korespondklubo. Nenia devigo. Konfidenca. Senkosta informo havebla en blanka, sigelita koverto. Skribu hodiaŭ kaj aldonu reafrankon al: Milson's Friendship (Regd.) Club, Dept. 13, Box 2871, G.P.O., Sydney, Aŭstralio.

S-ro W. Udo Segert, 305 East 75 St., New York 21, USA, dez. interŝ. bildkartojn kaj poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Certe respondos kaj afrankos per UN pm se dezirataj.

Sciĝu pri la nova ĉinio. Abonu la gazeton "El Popola Ĉinio". Aŭstr. Peranto: S. Bennett, 62 Brighton Ave., Croyden Pk., NSW.



Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.
Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

Vol. 11, N-ro. 58.

MELBURNO.

Julio-Aŭg., 1953.

ESPERANTO NO LONGER "FOREIGN"

COMMONWEALTH OF AUSTRALIA

Department of Immigration,
Canberra, A.C.T.
20th July, 1953.

Dear Sir,

**"La Rondo" — Journal of the
AUSTRALIAN ESPERANTO ASSOCIATION.**

Consent under the Publication of Newspapers in Foreign Languages Regulations was granted in March, 1947, to Mr. F. R. Banham to the publication by him of the Association's journal, "La Rondo."

Following representations made by Mr. R. L. Harry, it has been determined that Esperanto is not a "foreign" language within the meaning of the abovementioned regulations.

In the circumstances, action has been taken to withdraw the consent issued to Mr. Banham, and further consent to the publication of the journal will not be necessary.

Yours faithfully,
T. H. E. HEYES,
Secretary.

Mr. H. Koppel,
Secretary,
Australian Esperanto Association,
Box No. 2122T,
Post Office, Elizabeth Street,
MELBOURNE, Vic.

AL NIAJ EN- KAJ EKSTERLANDAJ AMIKOJ

Kiel la plimulto de niaj legantoj scias, ekzistas leĝo en Aŭstralio laŭ kiu ĉiu gazeto presita en "fremda" lingvo devas enhavi almenaŭ unu kvaronon de la teksto en la angla lingvo. Esperanto estis ankaŭ konsiderata kiel "fremda" lingvo. Simila leĝo ekzistis antaŭ kelkaj jaroj en Brazilo, sed la tiea movado kontraŭbatalis ĝin laŭ la vidpunkto ke Es-

peranto ne estas fremda, sed universala lingvo, kaj sukcesis forigi ĝin.

Ĉi tiu fakto instigis la A.E.A. komitataton, kiu pro principaj kaŭzoj deziris nuligi tiun leĝon. Ni tial kontaktis, pere de nia Komisiito por Registraraj Aferoj, s-ano Ralph L. Harry, la koncernan aŭtoritataton, kiu konsentis al nia vidpunkto kaj la supre presita letero estis la rezulto. —Herbert Koppel, A.E.A., Sekretario.

With Esperanto Around the World

GT. BRITAIN: The Royal Society of Arts organizes examinations in Esperanto. 97 candidates enrolled in the 1952 exams, placing Esperanto fourth among the languages used. In connection with the Annual Congress of the Scottish Esperanto Federation and the fiftieth anniversary of the Esperanto Clubs of Glasgow and Edinburgh, an exhibition was held in the Palace of Arts, Glasgow.

ITALY: Antonio Carcaterra, Under Secretary of Commerce, was among visitors to the Esperanto exhibition at the Commercial Fair of Viacenza. In Genoa, the Institute of Hygiene publishes Esperanto summaries in its official journal, "Igiene Moderna." The Franciscan Order in its periodical "La Voce di San Antonio" (The Voice of St. Anthony) publishes an Esperanto page regularly.

NETHERLANDS: The President of the Esperanto Academy, Mr. J. R. G. Isbrucker, has published an Electrotechnical Textbook for use in Dutch Schools and Colleges, with an Index in Esperanto, Dutch and Eng-

lish.

SWITZERLAND: The International Sanatorium in Leysing has made the study of Esperanto compulsory for all patients, physicians and members of the staff in order to facilitate mutual understanding and social life, which are of vital importance for the proper functioning of an international sanatorium for university people from many countries of the world.

U.S.A.: The American Journal of Physics published a long letter by Prof. F. J. Belinfante, of Purdue University, about "An International Language for Science." The writer mentions his own successful use of Esperanto for the publication of articles in *Scienza Revuo* (Holland) and in "Progress of Theoretical Physics" (Japan).

YUGOSLAVIA: On the occasion of the 38th Universal Esperanto Congress to be held at Zagreb, the Yugoslav postal authorities will issue a special postage stamp in honour of Esperanto.

SUBSCRIPTIONS RECEIVED

Mesd. Fowler, Hartman, Munnerly, Rawson, Stope, 12/6; Misses Dash, Hope-Crompton, Styles, 12/6; Messrs. Boyle, Hearne, Schmidt, Towsey, 12/6; Ghinzel, Smith, 6/3; Canberra E-Club, £4/8/-; Devonport E-Club, £1/11/3 (5 members); Wellington E-Club, 10/6; N.Z., Donaco Leo, 10/-; Sales Rondo, 6/6, 1/10; American Tea, £16/4/-; Miss Leach, Mr. C. Newman, 12/6.

De La Prezidanto

Karaj Gesamideanoj,

La 29-an de Julio nia estimata samideano Ralph L. Harry forvojaĝis al Svislando, kie li servos sian patrujon kiel ĉefkonsulo, sed ni esprimu al li ne nur niajn ardajn gratulojn pro lia honora distingigo, sed ankaŭ elkorajn dankojn pro tre grava klopodado, kiu fruktigis naŭ tagojn antaŭ lia foriro.

Jes, la 20-a de Julio estis tre grava tago en la historio de Esperanto en Aŭstralio, ĉar tiun tagon la Sekretario por Enmigrado, S-ro T. H. E. Hayes, anoncis, ke en la kadro de la

reguloj de lia departemento Esperanto jam ne estas fremda lingvo.

Kelkaj eble diros, ke ĉi tiu ŝango ne tre multe efikos sur la aŭstralia Esperantistaro, ĉar eĉ kiam ne plu estas necese presi unu kvaronon de nia gazeto en la angla lingvo, ni ankoraŭ tion faros pro propagandaj kaj financaj motivoj. Tamen eĉ nur oficiala mencio nin helpas, kaj la oficiala klasifiko povas esti la unua paŝo sur la vojo al plena oficiala rekonno.

Ho jes, ni devas konstante gardi kontraŭ tro da optimismo, sed ni ne lasu eĉ loketon por la pesimismo—kiel la dua lando ricevinta tiun distingon, Aŭstralio povas esti la unua faronta la duan paŝon!

Via prezidanto,
KEN G. LINTON.

Nia Gast-Artikolo

En nia lasta "Gast-Artikolo," la ĝenerala sekretario de UEA, s-ano C. C. Goldsmith rakontis al ni pri sia laboro en la UEA-oficejo.

Ĉar A.E.A. estas supertendeca E-organizo en kiu anoj de ĉiuj mond-

konceptoj amike kunlaboras por la disvastigo de nia lingvo, ni ankaŭ invitis la ĝeneralan sekretarion de la dua mondorganizo S.A.T., verki por ni "Gast-Artikolon". S-ano N. Bartelmes afable kompleksis kaj en la sekvanta artikolo li rakontas al ni pri la pariza E-vivo sub la germana okupado:

PARIZAJ ESPERANTISTOJ SUB LA GERMANA OKUPO

Al mi vi petas artikolon pri la vivo de l'parizaj esperantistoj sub la germana militokupado de la jaroj 1940-1944. Vi turnas vin al mi, kiel redaktinto kaj redaktanto de "Sennaciulo", la oficiala organo de SAT.

Bedaŭrinde mi ne povas tre bone plenumi vian deziron, ĉar mi ne estis pariza SAT-ano, loĝanto de Parizo, dum la dua mondmilito, escepte de kelkaj semajnoj en somero 1940. La tutan ceteran milit-tempon mi evitis, devige aŭ memvole, Parizon, neniam perdinte la germanan civitanecon kaj konsekvence devigata elturniĝi laŭ kiel eble plej lerta kaj sendomaĝa maniero.

Nu, ĉar tamen tiu temo multe interesas vin, mi esploris la arkivojn kaj konsultis s-anon Bannier.

Okazis tiel, ke ĉe milit-eksplozo, estante en Parizo, kaj ne dezirante fuĝi en hitleran Germanion, mi preferis la internigon fare de francaj aŭtoritatoj. La okupo de Parizo fare de la hitleraj soldatoj okazis la 13-an de junio 1940; la 28-an de junio mi liberiĝis el internejo en Suda Francio kaj revenis 3 tagojn poste al Parizo. Tie mi rilatis kun la restintaj kamaradoj, precipe gekamaradoj Glodo. Multaj estis for, en la ne-okupitan zonan, inter ili k-do Bannier, sekretario-administranto de SAT, kune kun sia labordonanto (banko). Neniu grupa kunveno plu okazis. Sed ankoraŭ en junio 1940 aperis presita bulteno de "SAT-Amikaro" (4 paĝoj), en kiu aŭdiĝis fidplenaj voĉoj, parte de tute novbakitaj esperantistoj. Por la 7-a de julio estis anoncita tuttaga ekskurso.

Tiuj SAT-amikaj ekskursoj karakterizas la tutan dummilitan kunvivadon de la parizaj laboristaj esp-istoj. Sed ankaŭ la renkontebla ĉiusabate ĉe le SAT-oficejo en avenuo Gambetta! Tie deĵoris P. Meyer, ĝis la reveno de Bannier, en 1942. Kaj ekde marto 1943 reaperas komunikilo de

"SAT-Amikaro", en formo de ciklostilaj leteroj, "konstatinte ke la plimulto de la iamaj SAT-anoj restis fidelaj".

En tiu unua "letero" troviĝas rekomendo al junaj kamaradoj rekrutotaj de la germanaj laborservoj, ke ili serĉu en SAT-jarlibroj adresojn el Germanio kaj Aŭstrio por ekkontakti kun tieaj kamaradoj. Laŭ tiu instigo ankaŭ la juna parizano Petro J. ekvizitis min en mia hejmo en Duesseldorf (1941), antaŭ ol li translokiĝis al Frankfurto (kie li ankaŭ kontaktis SAT-familiojn) kaj poste al Vieno, kie la esperantista kontakto kostis al li la liberecon kaj al la gastiganto la vivon.

Pluraj parizaj amikoj tiutempe estis militkaptitoj; aliajn trafis ekzekuto pro ilia judeco (ni nomu la bonan verkiston I. Jurysta). Grandaj "rendevuoj" okazis ĉiu-pentekoste en Nemurso (50 mejloj de Parizo); ili ĝuis multnombrian viziton kaj pasis tute neĝenate. Oni parolas kaj kantas esperante en arbaro, for de ĉia publiko. La tradicio pentekosta estas plue flegata ĝis la hodiaŭa tago. . .

Estas rimarkinde, ke formiĝis dum la militaj jaroj multaj novaj SAT-esperantistoj, precipe inter gejunuloj; el ili stariĝis forta kerno, tuj kiam la milito estis finita kaj la esperanta laboro iom post iom povis renormaliĝi.

Tiam, en julio 1945, la estraro de SAT adresis "Manifeston al la Tutmonda SAT-anaro", kiu trovis grandan, ĝojan eĥon en ĉiuj regionoj de la terglobo kaj akcelis la re-akiron de la movado; al la plimulto ĝi tre plaĉis, dum al kelkaj ĝi tre malplaĉis; ĝia praveco konfirmiĝis baldaŭ en la faktaj politikaj kaj ekonomiaj je la monda skalo.

Mi restis persone en daŭra kontakto letera kun la parizaj kamaradoj —malgraŭ ĉiuj baroj kaj riskoj—escepte de la periodo (en 1942), en kiu mi sidis en malliberejo kaj denove en koncentrejo. Kaj nelonge post la militfino la estraro de SAT en Parizo klopodis revenigi min al Parizo por deĵori en la sama posteno kiun mi tenis antaŭmilite. Nur en aŭgusto 1948 tiu klopodo portis sukceson.

—N. BARTELMES.

Premio Masel

Laŭ informo ricevita, ankaŭ poeziaj verkoj estas allasataj ĝis maksimume 30 strofoj.

9-A AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO

1-a ĝis 7-a de Januaro 1954, Perth, W.A.

Ĉar f-ino O. Stempel nun deĵoras en Albany sendu ĉiujn leterojn kaj aliĝpagojn ekde nun al: W.A. Esperanto League, Room 16, Bacton House, 723 Hay St., Perth, W.A. Nur kelkaj hotelĉambroj estas ankoraŭ haveblaj por tiuj kiuj TUJ rezervos, aldonante £1 kiel deponpagon.

La Kongres-kunvenoj okazos en "McNess Hall," Pier Street, en la urbcentro. La Akceptomango (1 Jan.) okazos en "Shaftesbury Hotel" en Stirling St.

Kotizoj: Partoprenaj membroj: 25/-; Patronoj: laŭ donaco (pli ol 25/-) Ne Partoprenaj Subtenantoj: 7/6.

Afable aliĝis ĝis nun kiel Patronoj:

S-ro C. Cain (Perth), £2/10/-

F-ino A. Curtis (Beenleigh, Qld), £3

S-no M. A. Hill (Perth), £2

S-ro H. Koppel (Melb.), £1/15/-

S-no F. Rawson (Melb.), 26/-

S-ro K. Linton (Melb.), 30/-

4-a Listo de Aliĝintoj:

19. F-no A. Longson (Perth)
20. S-no E. Klussendorf (Sydney)
21. F-ino F. Smith (Sydney)
22. S-ro J. Matasin (Sydney)
23. S-no J. Matasin (Sydney)
24. S-ro R. Harry (Canberra)
25. S-ro P. E. Schwerin (Sydney)
26. F-no D. Leach (Perth)
27. S-no F. Rawson (Upwey, Vic.)
28. S-ro L. Pfahl (Sydney)
29. F-no E. Proctor (Perth)
30. S-ro N. Gamble (Canberra)
31. S-ro J. Finch (Perth)
32. S-ro J. Hawks (Perth)
33. F-no J. Kempson (Adelaide)
34. S-no M. A. Hill (Perth)
35. S-no E. Turnbull (Camden, N.S.W.)
36. S-ro Joab Eljot (Sydney)
37. D-ro C. Caldera (Armadale, W.A.)
38. S-ro F. R. Banham (Melb.)
39. S-ro A. Towsey (Parkes, N.S.W.)
40. S-ro C. Cain (Perth)
41. F-no Amy Godfrey (Melb.)
42. S-no E. M. Hill (Melb.)
43. S-no Daniels (Perth)
44. S-no Jones (Perth)
45. S-ro Ken Linton (Melb.)
46. S-no Hitch (Perth)
47. Dr. Fridenbergs (Melb.)
48. S-no Mottram (Perth)

49. S-ro Stan Ling (Melb.)

50. S-no Mavis Ling (Melb.)

La bela ekspozicio de la "Canberra E-Klubo" estos montrata dum la kongresmajno en granda salono de la plej granda magazeno "Boans Ltd." en la centro de la urbo.

Venu kaj ĝuu la kongreson en bela Perth!

ESPERFUŬO

Mi konas ĉarmantan ineton;

Si havas allogan buŝeton:

Mi provis por kiso,

Sed ho! kia miso,

Ĉar trafis nur vangofrapegon.

—JOAB ELJOT.

Australia Kroniko

● **PERTH:** Dum Majo ni faris nian monatan kunvenon Socia Vespero. Nia Gasta Parolanto estis Dro Gani de la Universitato de Okcidenta Aŭstralio. Li donis tre interesan kaj informan paroladon pri Moderna Egiptujo. Ankaŭ kelkaj el niaj amikoj donis la muzikon por la vespero. Bedaŭrinde, tre malbona vetero dum la tago kaŭzis multajn malĉeesti.

En Junio, unu el niaj dum-vivaj anoj—S-ro A. Saar, donis tre interesan tradukon de kelkaj legendoj de la indiĝenoj en la Nord-Okcidento. La libreton pri la indiĝenoj eldonis la Caltex Oleo Kompanio, kaj la ligo intencas kontakti la kompanion, petanta ilin eldoni folietojn en Esperanto pri iliaj produktoj.

Frue en Julio nia Fraŭlino Stempel foriris al Albany al nova ofico en la infaneta lernejo tie. Ni gratulas ŝin.

Ĉe la Monata kunveno, S-ro N. Brodie donis al ni tre bonan paroladon pri tiu kurioza besteto, la Platypus. Ankaŭ ĉe tiu kunveno ni elektis novan bibliotekistinon—S-ino G. Pollard. Bedaŭrinde, S-ro J. Right nun havas tro da studado. Li estis nia lasta bibliotekisto.

Ni ankaŭ bonvenis Novaŭstralianon al la Ligo—S-ro F. A. Grimminck. Li venas de Utrecht, Nederlando.

—E. Bull.

● **ADELAIDE:** La junia kunveno de la Adelaide E-Societo estis la plej sukcesplena ekde la fondiĝo. S-ro Rutland el Sydney rakontis al ni pri siaj vojaĝoj pere de Esperanto tra multaj mondpartoj. Ni renkontis ĉe tiu kunveno multajn s-anojn kiuj nur

malofte povas viziti nin pro loĝado en la kamparo, kromlaboro aŭ aliaj kaŭzoj. Kelkaj komencantoj kiuj komencis lerni pasintan novembron nun jam povas plene partopreni la kunvenojn.

La ĵurnalo "South Australian Farmer" presis artikolon pri la subteno de UNESCO por Esperanto. Junula grupo en antaŭurbo petis parolonton pri E-o kaj la ĉiamvigla s-ano Rutland akceptis la inviton. S-ro Downing, nia prezidanto ekde la fondaĵo de la Societo en 1952, rezignis ĉar lia laboro okupas lin tro multe. Depost kelkaj monatoj li ne plu povis viziti la kunvenojn, dum kiuj nia vicprezidanto, s-ano Alfred Schindler, kompetente anstataŭis lin.

—Grace Barlow.

● **DEVENPORT (Tas.)**: Ni raportas kun ĝojo ke la "Devenport Esperanto-Club" estis fondita la 27-an de Julio, kaj jam aligis la unuaj membroj al A.E.A. Jen la komitato: Prez. s-ro C. Ramsay, Vic-prez kaj instruisto: s-ro W. Gerard; Sekretario: s-ro M. W. Ives; Kasisto: s-ro A. Benson, Bibliotekistoj: s-no K. Styles kaj s-ro R. Close; Societaj Arangoj: s-no W. Gerrard kaj s-ro S. Priest; Eksterlanda Korespondo: s-ro J. Blower.

La klubo kunvenas ĉiulunde ĉe "Adult Education Rooms", La loka gazeto "The Advocate" detale raportis pri la klubfondo kaj ankaŭ publikigis fotografaĵojn. S-ano Gerrard, kiu estas instruisto en la loka allernejo, dufoje semajne instruas krome 48 gejunulojn. Ni gratulas la novan klubon kaj esperas aŭdi regule pri ĝia progreso kaj bonvenigi reprezentantan ĉe nia kongreso en Perth.

● **CANBERRA**: De la 13-a ĝis 15-a Junio okazis nia longe atendita ekspozicio. Oni sukcesis akiri la halon de la Belarta Klubo, ĉe Riverside, kaj prezentis proks. 20 panelejojn da Esperantaj (sub titoloj "Korespondado", "Vojaĝado", "Komerco kaj Transportado", "Kongresoj", "Internaciaj Aferoj" k.a.). En aparta sekcio estis proks. 24 desegnaĵoj el la "Ekspozicio de Infan-arto", prezentita en Sidnejo antaŭ kelkaj monatoj.

Ĉe la oficiala malfermo de s-ro J. R. Fraser, Deputito por la ĉefurba teritorio en la Federala Parlamento, ĉeestis 50 personoj, kiuj ĝuis "antaŭvidon" de la filmo "Aŭstralio Hodiaŭ", ĵus eldonita kun E-komentario. Ili

ankaŭ ĝuis bonegan vespermanĝeton aranĝitan de la sinjorinoj de la sudflanka prupo. Bonaj raportoj aperis en "Canberra Times" kaj en la loka radiostacio.

La klubo bedaŭrinde perdas sian vic-prez., kaj fondinton, s-ano Ralph Harry, kiu estas sendata de la Departamento de Eksterlandaj Aferoj al Svislando.

Tamen, la klopodoj de la klubo etendiĝas: grupo formiĝos en Queanbeyan, 5 mejlojn for, en N.S.W., kies anoj studos tie, sed venos al Canberra por la ĉiumonata kunveno.

—HARRY TORR.

● **SYDNEY**: Kun plezuro ni povas raportii, ke nia kurso sukcese komenciĝis 18an Majo. Partoprenas ĝin dudek ok personoj, plejparte plenkreskuloj. La bonhumoro kaj vigeleco de la detale ellaboritaj lecionoj tenas la intereson de ĉiuj.

Elstara el la prelegoj faritaj en nia klubo estis rakonto, kiun faris sinjoro Fekonja pri vojaĝo al Japanujo. Li tre amuze kaj simpatie parolis pri la moroj kaj viv-kondiĉoj, kiel li trovis ilin.

En nia Junia socia vespero, sinjoro Chandler montris "la plej malnovajn movajn bildojn en la mondo", tre lertaj provoj de niaj avoj, igi lumbildojn pli koloraj kaj okulfrapaj. Li ankaŭ montris, sub devizo "Cirkaŭ la Tero je Okuloj Malfermaj", interesan serion da lumbildoj, kolektitan per Esperanta korespondado.

Gratulojn al S-ro Chandler pro la ?-datreveno de lia naskiĝtago, kiun ni festis en tiu vespero. Notu, ke en nia klubo, oni laboras je sia festo.

En Majo ni bonvenis al la klubo Francan samideanon, S-ro René Asselin, kiu ĵus alvenis al Aŭstralio. Li tre interese parolis al ni pri vojaĝo al Laplando. En tiu lando de la meznokta suno, oni uzas salon en la kafo anstataŭ sukeron, neniam malvestas sin por enlitiĝi, kaj neniam batalas.

Alia interesa, kaj por Esperantistoj tre aktuala, prelego "Ĉu la Edukado povas forigi Milton", kaŭzis vigan diskuton inter la grupanoj.—E.D.

S-ANO KIDD MORTIS

Kun plej profunda bedaŭro ni sciigas pri la morto de s-ano Clemens Kidd, pioniro de la E-movado en Brisbano, kaj Diplomito de B.E.A. Li naskiĝis ĉe Chelmeford, Anglujo,

kaj mortis en Brisbano 12.6.53, je la aĝo de 64. Li estis E-isto de post 1910.

S-ano Kidd estis tia malofta kombinaĵo de plensukcesa negocisto kaj afabla kaj agrabla sinjoro. Li estis sekretario de "Poultry Farmers Co-op. Society" de Kvinslando.

Pere de sia bonvolo kaj malavareco li multe helpadis al la Esperantistoj en Brisbano, kaj precipe la komercantoj sentos la mankon de lia amika helpemo, gvidado, kaj la kuraĝigaj vortoj kiujn li ĉiam pretis doni.

Tre kvieta, justa, honesta kaj bonhumora, li posedis la kvalitojn de simpatio kaj kompreno, kaj estis ĉiam preta doni helpon al la petanto, kaj la E-istoj ja perdis veran kaj valoran amikon.

Al la vidvino kaj la familio ni esprimas nian plenkoran kunsenton. Adiaŭ, Clem. Kidd! Ni tre fieras ke ni vin konis.

—S. L. PARRY.

● **MELBOURNE:** El la neelĉerpebla natura mondo S-ro Hanks ankoraŭfoje tiris materialon por alparolo (3/6). "Bestoj de Norda Kvinslando" estis la temo. Interesaj kaj surprize bonegaj estis la bildoj, fari-taj jam en la jaro 1908, kiujn li montris. Ili inkluzivis ankaŭ partojn de Green Island. Monotona, ofte malkuraĝiga, tamen ne ĉiam sen-interesa, kaj sufiĉe grava por la lando estas la vivo en seka, preskaŭ sen-arba, polvoventega regiono en nordorienta Sudaŭstralio, kiun spertis S-ino Koppel (1) kiel infano de signalisto kiu deĵoris ĉe la Broken Hill fervojo, (2) kiel gubernistino sur ŝafbieno en la sama regiono. Mapo kaj skizoj akompanis ŝian priskribon (10/6). Nekutima plezuro por klubanoj estis dimanĉa vizito (13/6) al Ekspozicio de francaj pentraĵoj, kiun gvidis S-ro Leerveld. Sian interesan informon pri la moderna arto li daŭrigis en la Klubejo (24/6). La granda diferenco inter la modernuloj kaj iliaj antaŭuloj li klarigis estas, ke ĉi tiuj celis prezenti al la homoj ĝuste kion la artisto vidis, dum tiuj celas instigi en la homojn la samajn sentojn, la emociojn, kiujn la artisto spertis je la tempo de pentrado. Mi povas nur aldoni; ke mi tre kompatas multajn modernulojn, kies sentoj sendube estas teruraj. Nova parolanto (17/6) estis S-ro Smith el Anglujo. Liaj spertoj inter la Araboj en

Palestino provizis la temon. Kontraŭe al la kredoj de multaj, li trovis ĉi tiujn homojn amikemaj, gastamaj kaj tute honestaj. Spite de malproksimo, S-ro Frank Halls sukcesis dufoje alparoli nin. Lia priskribo (24/6) de Bacchus Marsh—vilaĝo por orfoj el Anglujo, kie li nun deĵoras—estis informa, kaj lia vigla rakonto pri spertoj en Eŭropo (1/7) tro rapide pasigis la vesperon.

S-ANO HARRY VIZITIS MELBURNON

Vere instiga okazo por feliĉuloj kiuj partoprenis estis la surprizvizito de s-ano Ralph Harry el Canberra. Telefonsciigo elektrigis la A.E.A.-Sekretarion, telefonoj zumadis, kaj pere de afabla kunlaboro rapide organiziĝis ĝuinda dimanĉo (5/7). S-roj Linton kaj Cohen disponigis aŭtomobilojn, en kiuj areto faris rondveturon de la urbaj ĉirkaŭaĵoj. Piknika refreŝiĝo en Botanika Ĝardeno dank' al s-ino Linton kaj vespermanĝo en hungara restoracio provizis oportunojn por babilado. Fine ĉiuj iris al la hejmo de ges-roj McKenzie, kie kunvenis aliaj por pasigi interesegan vesperon. S-ano Harry priskribis kiel li unue fariĝis E-isto kaj kiel en sia diplomata servo li konstatis la bezonon de internacia lingvo kaj kies rezulto estis la fondo de la Canberra E-Klubo. Sekvis diskutoj, kiujn partoprenis diversnaciaj s-anoj. Ĉiuj ĝojis havi okazon konatiĝi kun la laborema kaj entuziasma samideano el Canberra antaŭ ol lia foriro al diplomata deĵoro en Genevo.

—O. B. SERVANTO.

SURVOJE AL ZAGREB



Nia ĉijara reprezentanto al la 38-a Universala E-Kongreso en Zagreb estas f - ino Lorna Samblebe. Ŝi komencis lerni E-on en Aprilo 1950 en klaso de D-ro Fridenbergs ĉe la Melburna E-Klubo. A.E.A. akiris por ŝi denove prezentleteron de la aŭstralia ĉefministro kun salutoj al la mondkongreso.

Si forlasis Melbourne fine de Marto. En Londono ŝi estis kore bonvenigita en la oficejo de la Brita E-Asocio kaj ĉe la kunvenoj de la Londona E-Klubo, kie ŝi i.a. dancis kun D-ro Ivo Lapenna. En Rickmansworth ŝi subskribis la gastlibron en la U.E.A. oficejo kaj alparolis la lokan klubon. Je Pentekosto ŝi partoprenis en Bournemouth la 37-an Britan E-Kongreson, kie ŝi transdonis la salut-ojn de la aŭstralia Esp-istaro.

Dum vizito al Parizo ŝi i.a. partoprenis en la "Sorbonne" Universitato, prelegon de nia fama ŝercpoeto Raymond Schwartz. Sekvis tre ĝuinda rondveturado tra Danlando, Svedujo kaj Norvegujo, kiu portis ŝin multe preter la arкта cirklo. Tiel norde kiel Narvik, en la regiono de la noktmeza suno, ŝi estis kore gastigita de gesamideanoj.

En Vieno, ŝi alparolis grandan kunvenon de lokaj s-anoj, en kiu ankaŭ parolis s-ano Hans Jakob, redaktoro de "Esperanto" kiu, survoje al Zagreb, restis en Vieno. Fine de Julio ŝi partoprenis en Klagenfurt la 6-an Aŭstrian E-Kongreson, kie ŝi ankaŭ alparolis la anaron nome de A.E.A.

—H.K.

"AŬSTRALIO HODIAŬ"

Sub tiu-ĉi titolo la Novaĵ- kaj Informoficejo de la aŭstralia registaro ĵus pretigis belan kolorfilmon kun Esperanto sonstrio. Kiel ni jam raportis en nia n-ro 51 (Junio/Julio 1952) estis la verko de nia senlaca "magiisto", s-ano Ralph Harry, kiu ebligis tiun eksterordinare belan filmon, kiu nun estos prezentata al eŭropaj E-Kluboĵ. La filmo daŭras proks. 30 minutojn kaj montrás la multvarian aspekton de la kultura kaj ekonomia vivo de Aŭstralio. Tiu-ĉi filmo certe kontribuos multe por reklami Aŭstralion tra la tuta mondo.

Recenzoj

STUDENTA VIVO EN JAPAN-UJO eld. Esperanto Grupo en Kioto Universitato, konsistas el pluraj ŝablomitaj folioj. Ĝi estas plejparte kroniko pri la politika agado de junaj studentoj kiuj instigis strikojn, surstratajn demonstraciojn, kaj malobeado al la reguloj, por kontraŭi "ruĝan purigon", "frakasi malbonan leĝon",

k.t.p. Ili ignoris la oficialan anoncon de la Universitato, kiu malpermesis strikojn pro tio ke: "striko baras plenumon de studado kaj ofico, kiun socio komisiis al universitato. Nome forjeto de ofico estas nenio ol simmortigo de universitato." La nivelo de lingvo kaj preso estas bedaŭrinde malalta. Pluraj frazoj estas tre dubasencaj kaj multloke la folioj estas apenaŭ legeblaj.

EVANGELIA KANTARO. Eld. Kristliga Esperanto-forbundet, Vermastaregatan 18, Orebo, Svedujo. Broŝ. 80 paĝoj; prezo: sv. kr. 2.50 plus afranko. Bone presita kolekto de himnoj el diversnaciaj fontoj, kun notoj por la melodioj. Ses paĝoj estas dediĉitaj al biografaj informoj pri la verkintoj, tradukintoj, kaj komponistoj.

ORDO DE EVANGELIA DIS-ERVO, eld. Norvega Sekcio de K.E.L.I., Nebergatan 9, Oslo. Ĝi prezentas esperantlingve la Dimanĉmatenan Diservon de la konfeso Lutera laŭ Norvega tradicio, kaj enhavas ankaŭ la notojn por la koncertaj ĉantoj. Havebla de la supre menciita sekcio, kontraŭ unu resp. kup.

ESPERANTOMISSIONEN, Klackavagen, Nora Stad, Svendujo, eldonas evangelian serion de du-tri-foliaj kajeroj, kies celo estas "konigi la Savon en Kristo." La materialo estas interese prezentita, lingvo, preso, kaj papero estas bonaj. N-roj 1-4 estas haveblaj rekte de la eldonejo por unu resp. kup.

INFANOJ DE L'ATOMBOMBO, de Osada Arata. Eld. Japana Esperanta Librokooperativo, Osaka. broŝ. 70 paĝoj. Ricevebla kontraŭ 6 rpk. ĉe la eldonejo. Ses jarojn post la eksplodo de la unua atombombo, Dr. Osada, profesoro en la Hiroŝima universitato, kompilis kaj publikigis kiel kontribuon al mondpaco, la materialon kiu nun prezentigas al la Esperanta publiko en resuma traduko. Gejunuloj kiuj kiel infanoj hazarde postvivis tiun teruran sperton, skribis siajn memorojn kaj impresojn. Ili estas korŝiraj, kiel devas esti la suferoj de infanoj de kiu ajn urbo. Amsterdamo, Coventry, k.c. kiuj vidis mortí aŭ kripliĝi siajn gepatrojn kaj gefratojn. La postmilitaj suferoj de mense kaj korpe rompitaĵ homoj—egale ĉu ili rezultis de eksplodego aŭ de plurjara torturado en deviga laboro sur la "Burmah Vojo"—estas tremiga spek-

taklo por la kunhomoj. La unikeco de la Hiroŝima tragedio kuŝas en tio ke en ĝi koncentriĝis laŭ tempo-daŭro kaj efikeco, rezultoj kiuj aliloke kaj alimaniere atingiĝis nur post longdaŭraj bombardoj. Espereble ĉi tiu libro helpas en la laboroj de vere pacamantaj asocioj ekstermi ne nur la atombombon, sed la militon mem.

—I.P.H.

LETERO EL LA TRANSCENDO.

A. B. Krempel; trad. M. M. Mielert. 35 pj. prezo Gm. 1.20. Eld. Limburger Vereinsdruckerei, Limburg/Lahn, Germanujo.

Fraŭlino mortis, kaj pro sia forfalo de la pura kredo kaj ago, iris en inferon, kiu estas, laŭ Suarez, difinita loko, kaj, "laŭ ĝenerala opinio" ie en la terinterno (p. 35). Amikino en sonĝo ricevis leteron de ŝi, en kiu ŝi priskribas sian suferadon, konfesas kaj avertas. Interese, ke katolikoj kondamnitaj pli suferas ol nesamkreduloj, kaj ke neniu suferas pli ol li meritis. "Transcendo" ne estas bona por "Jenseits." La trad. devus konsulti la Plenan Vortaron SAT. Kial ne "transa mondo", aŭ "infero"?

—F.R.B.

Lingvaj Problemoj

PRI LERNEJOJ.

Kindergarten: infanlernejo, P. Schwerin konsilas "infanĝardeno" ĉar tiu vorto estas internacia.

State (en Anglujo: council) School: ŝtata popollernejo.

Public (Grammar) school: preparejo por la universitatoj; gimnazio.

College (unu el kelkaj formantaj universitatoj (ekz., la kolegioj de Oksfordo): supera organizo la instruituloj, kiuj studas kaj instruas apartajn lernobjektojn.

Teachers' Training College, Normal School: instituto por instruistoj. Ne uzu "normala lernejo", kiu estas Francismo.

Technical School, Polytechnic: teknika, metia lernejo.

Commercial School: komerca lernejo, por oficejistoj.

Lycee: "State secondary school in France". La Plena Vortaro iom strange difinas ĝin per "mezgrada lernejo" kaj "gimnazio".

Academy: Zam. uzis "akademio" nur laŭ la senco de ia supera korporacio de scienculoj. La Brita, Franca Akademio; la Reĝa Akademio de Sciencoj. La Germana "Akademiker" estas studento, univtrsitano. La Francoj uzas "academie" laŭ iu difino por "nuda homfiguro".

En "Letero al Borovko" (trad. Gernet kaj aprobata de Zam.): "kiam el la Bjelostoka reala lernejo mi transiris en la Varsovian duan klasikan gimnazion. . . ." Reallernejo en Germanujo estas lernejo laŭgrade inter popollernejo kaj gimnazio. Pri simila ŝajne skribis Z., ĉar certe li ne vizitis komercan lernejon aŭ similan. La P.V. ne difinas "real-" plus "lernejo."

High School: la Germana "Hochschule" estas komuna esprimo por univ., teknika, komerca, muzika, veterinara, arta atlernejo. En Aŭstralio "high school" estas inter alio preparejo por universitatoj.—F.R.B.

KIAL HAZARDLUDI PRI VIA VIVKUNULO?

Se vi estas soleca oni prezentos vin al la por vi plej taŭgaj amikoj. Multaj solencaj geviroj, novaj kaj malnovaj aŭstralianoj kaj transmariuloj el ĉiu vivsfere, aĝgrupo kaj religio estas anoj de nia Internacia Korespondklubo. Nenia devigo. Konfidenca. Senkosta informo havebla en blanka, sigelita koverto. Skribu hodiaŭ kaj aldonu reafrankon al: Milson's Friendship (Regd.) Club, Dept. 13, Box 2871, G.P.O., Sydney, Aŭstralio.

THUN: Belan prospekton sendas senpage s-ano F. Schwartz, Wiesenstr. 1; THUN, Svislando.

BINGEN: Petu belan turisman broŝuron de: Verkehrsamt, Museumstrasse, BINGEN am Rhein, Germanujo.

Dez. Koresp kun gestudentoj aŭ E-istoj pri temoj diversaj: S-ano HURUJA-Kijoŝi, ĉe s-ro Huruhaŝi, 91 Hisakala - maĉi, Bunkjoo - ku, TOKIO, Japan.

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redakcio: A.E.A., Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne, Australia.
Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

Vol. 11, N-ro 59.

MELBURNO.

Sept. - Okt., 1953.

With Esperanto Around the World

● **AUSTRIA:** The Austrian Postal Authorities have issued a series of 11 postcards with pictures of Tyrol and Vorarlberg and explanatory notes in German, English, French and Esperanto.

● **ENGLAND:** The 26th World Congress of Labour Esperantists (S.A.T.) took place in Wortley Hall, near Sheffield, in July. 185 delegates from 8 countries were welcomed by the Mayor of Barnsley. Wortley Hall, a former castle residence, has been converted into a Recreation Centre of the National Council of Labour Colleges. Next year's S.A.T. congress will be held in Nancy (France).

● **FRANCE:** Esperanto is taught officially in the Primary Schools of Alsace-Lorraine. The Minister of Education decided that Esperanto may replace German in the final classes, if the students so desire.

● **SPAIN:** The technical radio magazine "Radiovision," of Madrid, gives Esperanto resumes of its various articles.

● **YUGOSLAVIA:** 1760 delegates from 30 countries took part at the

38th Universal Esperanto Congress in Zagreb. The Yugoslav Postal Authorities issued a special postage stamp for the occasion.

A biography of Tito was translated into Esperanto from the English original by Mr. Mason Stuttard. In a special audience granted to him and three leaders of the Yugoslav Esperanto Movement, Marshall Tito surprised the visitors by speaking a few words in Esperanto and he explained that he had learned the international language some years ago while in prison.

● **TOURIST LITERATURE:** Many European cities have lately issued beautiful folders which are available free on application. BONN (Staedt, Verkehrsamt, Bonn, Germany), HANNOVER (Staedt. Verkehrsamt, Hanover, Germany), NUERNBERG (Verkehrsverein, Lorenzerstr. 31 Nuernberg, Germany), HAARLEM (Inlichtingenbureau, Stationsplein 1, Haarlem, Holland), PADOVA (Fiere Internazionale, Via N. Tommaseo, Italy), VAASA (C/-Klubo Esperantista, Laihia, Finland).

FOR OUR EXAMPLE.

Mr. A. J. Sinclair, of Te Awamutu, died in Auckland in June last. His four years of Esperanto life were so packed with useful work for the movement that he merits presentation as an example of what can be done by a devoted individual in so short a time. From the "New Zealand Esp. Bulletin" we learn that he gave many lectures on Esperanto in Ro-

tary circles and schools; founded the Te Awamutu E. Club, published a brochure "Basic English or Esperanto?"; posted 2000 letters of greeting to E. clubs throughout the world; corresponded with 43 countries; issued a 10p. "Kio estas Rotario-Klubo" (from 1000 posted he received 1200 letters from 50 lands); published "UNO's Great Need—An International Language," 19p. As a

result of his activity several E. classes were founded in colleges and high schools. He was "ideas officer" for N.Z.E.A. for three years, and a leading authority on dairying and Scottish history, subjects on which he also found time to frequently lecture.

Could you beat this grand record—or even emulate it with work even partly comparable in extent and effect? Here was a man.

—F.R.B.

PRI AKVARIOJ.

Ciu havantan intereson pri fiŝkulturado estas petata skribi al A. Blickman, Schouwstraat 16, Nieuwendam—Amsterdam, por detaloj de mondorganizo de fiŝamantoj.

MORALA REARMADO. Uzas E-on. Subtenu per skribo al Internacia Grupo Esperantista de Morala Rearmado, Nordgaarden 7, Koge, Denmark.

PYKE

MEMORIAL EXAMINATION.

This exam. will be held in November next year, if not fewer than six candidates enter. Classes formed from November this year, therefore, may provide entrants for the special prize of 5 gns. for the best student who has not studied the language more than 12 months. So, form classes before Christmas!—F.R.B.

LIBERA FORUMO.

Legantoj, montru intereson en la gazeto per leteroj al tiu rubriko. Sugestojn, plendojn, laŭdojn sendu al la redaktoro. Ciu numero enhavu minimume unu lettron, pri kiu ajn flanko de nia laboro. Ni celas aperigadi duonpaĝon da trafe esprimitaj verkajetoj, kiujn vi avide legos. Ne lasu la ideojn senvoĉe, senutile ĉasadi unu la alian en via cerbo; donu ilin al nia rondeto por ke pensoj fariĝu agoj, eble helpaj por nia gazeto kaj nia afero entute.—F.R.B.

REDAKTOROJ—ELDONISTOJ— INSTITUTOJ!

Bv. adresi presajojn, informojn al la Redaktoro, F. R. Banham, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria, Aŭstralio. La Rondo akurate iras al ĉiu ejo, kiu regule sian sendas. Dankon!



Pasintnumere ni raportis ke nia estimata s-ano R. L. Harry forlasis Aŭstralion por deĵori kiel aŭstralia reprezentanto ĉe la eŭropa oficejo de UNO en Genevo kaj kiel ĝeneral-konsulo. Li jam alvenis en

sia nova labor-kampo kaj en la ĉi-suba artikolo li priskribas siajn unuajn spertojn kun svisaj samideanoj:

EN SVISLANDO

Vesperigis kiam mi marŝis la unuan fojon tra la "Rue Ferdinand Hodler" al la kunveno de la E-Grupo de Genevo, urbo plena de historiaj memorigaĵoj, inter kiuj multaj pri la herooj de nia movado. Ekzemple, la strato estas nomita pro la konata svisa pentristo, la patro de Hector Hodler, la fondinto de la Universala Esperanto-Asocio. Malsimile al kelkaj eminentaj pentristoj kies verkajoj ne estis alte taksataj dum siaj vivoj, la pentraĵoj de Ferdinand Hodler estis multe ŝatataj kaj oni pagis grandajn prezojn. Pro tio la patro riĉiĝis kaj la juna Hoŭler povis sin dediĉi plentempe al la organizado de la E-movado kaj al la redaktado de la ĵurnalo "Esperanto" kiun li kreis. Post lia morto lia "infano" transdoniĝis al UEA kune kun financaj rimedoj por helpi pri la daŭra eldonado.

Proksime, en la "Rue Candolle", situas la Brasserie (Trinkejo) Landolt. Al la neinformita vizitanto ĝi aspektas tute ordinara kaj seninteresa, simila al la dudekoj da kafejoj kiuj troviĝas ĉie en la malnova kvartalo de Genevo. Sed antaŭ pli ol 35 jaroj oni ofte vidadis entuziasmulon, eksigitan de sia patrujo, kiu trinkadis tie apud angula tablo dum la longaj vintraj vesperoj. Lia nomo? Estis Vladimir Ulianov, la postoma regonto kaj organizanto de la USSR, pli bone konata kiel "Lenin".

Sed tiun vesperon mi ne atentis la fantomon de la mortinta komunisto ĉar sur tiu tablo en la angulo flirtis flago kun verda stelo kaj ĉirkaŭsidis grupo, babilanta kaj ŝercanta, inter kiuj S-ro Bouvier (bofrato de Edmond Privat) kiu prezentis min al la aliaj. Mi citas nur Hans Jakob, dum

multaj jaroj la Direktoro de UEA kaj nun la redaktoro de "Esperanto".

Dum 2 horoj ni parolis kaj interŝanĝis fotojn, novaĵojn kaj spritaĵojn kiujn ĉiam oni renkontas inter la samideanoj. Mi mencias la filmon "Aŭstralio Hodiaŭ" kiun mi ĵus ricevis de f-ino Samblebe. Oni sugestis ke la filmo estu montrata dum la 50-jara jubileo de la Svisa E-Societo, kiu okazos la venontan dimanĉon . . .

Tiel mi trovis min, la 17-an de septembro, en la urbeto Morges, inter Genevo kaj Lausanne, sidanta sur kanapo kun D-ro Privat kaj s-ro Jayet (la UEA-del. de Morges) dum ili prelegis al 50 reprezentantoj de la S.E.S. pri la jubileo de la movado en Svislando. Bedaŭrinde la aparato havebla en Morges ne taŭgis por filmo kun sonstrio, sed mi prelegis pri Aŭstralio kaj la aŭstralia E-movado. Dum lunĉo apud tabloj diseminitaj de malgrandaj verdaj steloj, mi renkontis Maria Gruenig (Verda Maria) kaj aliajn gvidantojn de la Svisa Societo. Kaj mi reiris al Genevo aŭdante en la creloj la muzikon de "La Espero".

—R. H. HARRY.

40-A JAPANA ESPERANTO-KONGRESO.

En la konata universitata urbo Okayama okazis de la 19-a ĝis 21-a de septembro la 40-a Japana E-Kongreso. La kongres-urbo estas nomata la "japana Nuernberg" inter japanaj E-istoj, ĉar estis tie kie fondiĝis antaŭ 50 jaroj la unua E-grupo sub gvido de angla s-ano Gunlett, kiu estis profesoro de tiea kolegio. Ĉe la Amikiĝa Kunsido estis parolata tre interesa rememoro de 70-jara veteranino kiu mem eklernis nian lingvon en tiu epoko.

Partoprenis la kongreson proks. 200 samideanoj, inter ili, kiel sola eksterlandano, usona s-ano A. C. Blatt, kiu ankaŭ prelegis en la Kongresa Universitato. Salutletero de via sekretario, s-ano Herbert Koppel, estis fotografiata kaj ĝia negativo projekciita sur ekranon, okaze de la Malferma Soleno, por ke ĉiuj klare komprenu la enhavon. La prezentmaniero estis nova kaj eksterordinara kaj tio altiris apartan atenton de ĉiuj kongresantoj, kiuj responde sendis elkorajn salutojn al vi ĉiuj aŭstraliaj gesanoj.

En la kadro de la kongreso okazis

ankaŭ la ĝenerala kunveno de Japana E-Instituto, fakkunsidoj i.a. de kuracistoj, sciencistoj, instruistoj, fervojistoj, Budistoj, Kristanoj, blinduloj.

Per tuttaga ekskurso finiĝis tre sukcesplena kongreso.

—Y. WASEDA (Nagoya).

ORHARA NITA!

Suno brilas,
Birdoj trilas,
Ĉarmas ĉiu floro!
Gaja estas
Mi, ĉar nestas
Am' en mia koro!

Per glor-flamo
De la Amo
Ensortiĝis ĉio!
Mi, pagano,
Ter-infano,
Jam en Paradizo!

Se ci troupu,
Kaj disrompu
Am-magion, Nita,
Ĝis infero
El ĉielo
Estos mi ĵetita!

—JOAB ELJOT.

ANIMA TRANKVILO.

Ĉu vin logas la maro kun senbrida
ondaro,
Aŭ lunlumo brilanta sur lago?
Ĉu vin ravas l'odoro delikata de
floro,
Aŭ ŝaŭro herolda de l'tago?

Ĉu l'infana ridado kaj la birda pepado
Ĉiam estas por vi la muziko?
Ĉu l'rigardo al stelo en la nokta ĉielo
Vin vibrigas per ia mistiko?

En la vasta afero, l'universa mistero,
Vian propran etecon konante,
Ĉu vi tamen insistas, ke la devo
ekzistas
Bone agi al ĉiu konstante?

Ĉu vi fide esperas kaj kuraĝe oferas,
Konsciante pri via kunulo,
Ke li, nobla aŭ fia, ĉu eĉ aĉa aŭ dia,
Tre similas al vi, la pekulo?

Ĉu la koro doloras, kiam homo
angoras?
Ĉu vi sentas al tiu kompaton?
Ĉu vi donas libere kaj parolas sincere
Por moligi al li tiun baton?

Aŭ pri iu ajn kredo, kies vera posedo
Al adeptoj instigas fratami,
Kaj vivadi pli bele, harmonie, altcele,
Ĉu vi volas la benon proklami?

Kun la ĝusta akordo malfermiĝas la
perdo

Al senlima anima trankvilo.

Ne valoras ja io ajn pli alte ol tio,

Al la vera ĉielo ŝlosilo.

—KEN G. LINTON.

38A UNIVERSALA E-KONGRESO



Zagreb, ĉefurbo de Kroatoj akceptis 1760 kongresanojn el 30 landoj. Ok registaroj sendis oficialajn reprezentantojn, kiuj alparolis la ĉeestantojn dum la Malferma Festkunveno. En la nomo de la aŭ-

stralia registaro, f-ino Lorna Samblebe (Melbourne) diris la jenajn vortojn:

"Mi ĝojas, ke ankaŭ al ĉi-tiu mondkongreso la Aŭstralia Registaro sendas pere de mi siajn oficialajn salutojn, same kiel lastjare ili estis transdonitaj de s-ano Frank Halls. La bonvolema sinteno de mia registaro dum la lasta jaro pruviĝis per eldono de 30-minuta tutesperanta kolorfilmo "Aŭstralia Hodiaŭ", havebla al eŭropaj E-kluboj pere de aŭstraliaj konsulejoj. Tion ni ŝuldas al nia konata s-ano Ralph Harry, ĵus nomita Aŭstralia Reprezentanto ĉe la Uuniĝintaj Nacioj en Genevo kaj samtempe Generalkonsulo tie. Li jam transdonis detalan skizon pri la E-movado kaj historio al nia Ministerio por Eksterlandaj Aferoj, por prezento al la venonta Generala Kunveno de Unesko. La Ĉefministro rajtigas min transdoni la bondezirojn de Aŭstralia al la 38a Univ. Kongreso de E-o, kiu li esperas plene sukcesos!" (Tondra aplaŭdo sekvis).

19 landaj E-asocioj estis reprezentitaj kaj f-ino Samblebe, nome de AEA salutis kiel unua:

"La frateca akcepto ĉe s-anoj en multaj eŭropaj urboj kaj la imponaj impresoj kiujn mi forportos de ĉi-tiu kongreso, tute nuligas la senton de

foreco, kiun mi havis dum mia longdaŭra vojaĝo al Eŭropo. Malproksima estas mia lando, longaj distancoj kuŝas inter la kluboj de la granda aŭstralia kontinento kaj malhelpas interrilaton, sed laŭdevene ni estas kosmopolitaj, laŭtradicie liberaj, kaj la alfluo de multaj eŭropaj E-istoj dum la lastaj jaroj instigas freŝaŭ entuziasmon por nia ideo. Nenie tiel bone kiel en ĉi-tiu kongreso evidentiĝas la unueco de la homaro, kaj la Aŭstralia E-Asocio ĝojas havi la oportunon deziri al la kongreso sukceson sur la vojo al niaj komunaj idealoj."

La Prezidanto de la Kroata Registaro, D-ro Vladimir Bakarić, la urbestro de Zagreb kaj oficiala observanto de Unesko salutis la kongreson kaj D-ro Privat faris brilan festparoladon. La kongreso multe suferis sub akra varmego (108° F. en la ombro!) kaj kvankam la artaj kaj kulturaj vesperoj estis sur altega nivelo, la ĉiama varmego forrabis multe de la plezuro.

Post la Univ. Kongreso nia reprezentantino veturis al Woergl (Aŭstrio) por partopreni la 9-an Kongreson de la Tutmonda Junular-Organizo. Pli ol 100 gejunuloj el 9 landoj ĉeestis. La estraro de TEJO metis belan florkronon ĉe la tiea Zamenhofmonumento. La solenaĵo estis disaŭdigita de Radio Innsbruck, dum kiu oni ankaŭ intervjuis Lorna Samblebe. Post semajno en Woergl, Lorna pasigis tutan monaton en bela Svisujo antaŭ ol ŝi reiris al Britujo por fari rondveturadon tra Skotlando kaj Irlando. La 5-an de Novembro ŝi forlasos Anglujon revene al Melburno kie ŝi ĝustatempe alvenos por partopreni la ĉi-jaran Zamenhofan Feston, dum kiu oni planas specialan bonvenigon por ŝi.

AUSTRALIA KRONIKO

● PERTH: Frue en Septembro, kvar anoj veturis al la Sanigejo por tuberkulozaj pacientoj ĉe Wooroloo, proksimume 40 mejlojn oriente el Perth. La Direktoro konsentis al ni uzi la mikrofonon, kaj la grupo komencis lecionojn inter proksimume 25 pacientoj. Alia grupo veturos al ili ĉiun duan semajnon.

Je la 10a de Septembro, naŭ el niaj anoj pretigis nian elmontraĵon por la "Nacia Flor-Tago" en Perth je la 11a. La elmontraĵo estis tre sukcesa, sed ne gajnis premion.

Alia Ano, Sinjorino Sedgley, nun gvidas malgrandan klason ĉe Darlington.

Je la 17a de Septembro, S-no G. Pollard, donis al ni tre bonan paroladon pri—"La Milito en Okcidenta Aŭstralio, 1932." Multaj el ni memoris pri la afero en Novembro, 1932, kiam la dromajoj venis el la nordo por serĉi akvon kaj nutraĵon. Sed, la farmbienistoj ne ŝatis la dromajojn kiam ili manĝis kaj detruis iliajn rikoltojn de tritiko. Do, ili petis helpon de la Armeo. Kelkaj oficiroj kaj soldatoj iris en la batalon kun maŝin-pafiloj, sed la dromajoj ankoraŭ venis. La tuta afero fiaskis post ok tagoj, kaj la soldatoj hejmeniris, kaj la farmbienistoj devis atendi la pluvon.

Tre plaĉis al ni denove vidi D-ron Caldera kaj S-ron Cettini inter ni ĉe nia monata kunveno, je la 17a. Nun estas ses kandidatoj por la Premio Masel.—E. BULL.

● **MELBOURNE:** Inter 8/7 kaj 7/10 okazis tro multe por detala priskribo. Tamen distris la Klubanojn sufiĉe varia programo. Informriĉaj estis priskribo de libro pri diamantspirtulo, Jules Jores, de S-ino Hill (15/7), parolado pri S.A.T.-organizaĵo de S-ro Leerveld (29/8), priskribo de libro pri Parizo de S-ro Ghinzel (9/9), interesajoj el la laborkampoj de D-ro Fridenbergs (16/9) kaj rakonto pri ferio en Mildura de S-ro Drummond (23/9); amuzo troviĝis en anekdotoj el la juneco de S-ro Drummond (23/9); amuzo trogviditaj de S-ro Burstejn (22/8); kaj bonan ekzercon por ĉiuj provizis demandaro de F-ino E. Godfrey (8/9) kaj diskutoj gviditaj de S-ro Leerveld (2/9) kaj S-ro Koppel (30/9 kaj 7/10).

Kortuŝaj kaj pensinstigaj estis la filmoj pri atombombita Hiroŝima montritaj de S-ro Okie (5/8) kaj speciale interesaj kaj belaj estis aliaj pri la kamparo inter Ballarat kaj Melbourne montritaj de F-inoj Stella Rosengrave kaj A. Godfrey. Tre grava por la A.E.A.-kaso estis la vespero de 19/8, kiam okazis denove granda merkato en la Klubejo. Ĉiu kunportis vendaĵon kaj ĉiu elspezis multe por acetajoj kaj loterioj. La tuta enspezo kun donacoj estis pli ol £16. Nur per tiaj aldonaj enspezoj "La RONDO" daŭre aperos. Ĉu aliaj Kluboj ne povus fari tiel same?

RENDEVUO: Ĉe la Julia kunveno, prelego de S-ro Burstejn pri "La Memoro kaj Kiel Ĝi Funkcias" forte interesis la ĉe-estantaron kaj instigis viglajn diskutojn kaj provojn poste. S-anoj ĉe la Aŭgusta kunveno denove ĝuis viglan paroladon de D-ro Fridenbergs, kies interesa materialo troviĝis en bela kamparo ĉe Eildon, en grandega inĝeniera projekto pri akvo konservado kaj en la tieaj diversnaciaj laborantoj. La parolinto mem portempe perlaboris kiel termezuristo. Rakonto de S-ro Koppel pri la vivo en Anglujo post la komenco de Milito kaj translokiĝo trans la Atlantikon al Kanado estis plena de incidentoj interesaj, informaj kaj amuzaj, kaj streĉe tenis la atenton de la Septembra ĉe-estantaro.—F.F.K.

● **CANBERRA:** Dum nia julia kunveno la ĉefa okazaĵo estis nomata "Hat Night". Multaj temoj, kiel ekzemple, "Ĉu homo iam flugos al la luno?", "La Perta Kongreso", "U.E.A." k.a. estis skribitaj sur slipetoj, kiujn la anoj hazarde prenis el ĉapelo, kaj devis priparoli. Ĉiu, eĉ la plej nova lernanto, sukcesis diri kelkajn vortojn, kaj ĉiu ĝuis kaj la paroladojn kaj la vespermanĝeton. Ses klasanoj el Queanbeyan ĉeestis. Sabate, 8-an Aŭg., okazis Esperanto-ekspozicio en la altlernejo de Queanbeyan, kies estro disponigis ĉambron al nia klubo.

En aŭgusto ni kunvenis la unuan fojon en nia nova kunvenejo, la halo de la "Good Neighbour's Council", ĉe Riverside. S-ano N. Gamble montris lumbildojn pri Nov-Zelando, pruntitajn de la Altkomisaro por Nov-Zelando, kies oficejo volonte pruntus bildojn ankaŭ al aliaj grupoj. Pro simileco de celoj ni aliĝis al "Good Neighbour's Council" kaj sendas deleĉiton al la kvaronaraj kunvenoj de tiu organizo.

Niaj 3 anoj en Cooma translokiĝis al Sidnejo. Por konservi kontakton kun ili, kun niaj anoj en Queanbeyan kaj en Canberra mem, ni nun eldonas monatan bultenon, unu semajnon antaŭ la monata kunveno, ĉefe por alvoki al la kunvenoj.—Harry Torr.

GRATULOJN

al la Canberra E-klubo sendas la A.E.A. estraro pro ilia bonega bulteno, kies unuaj 3 n-roj ni jam ricevis. Multobligita sur verda papero,

ĝi informas detale la anojn pri venontaj kaj pasintaj aranĝoj de la klubo, parte angle parte en Esperanto. Speciale menciinda estas amuzaj poemetoj, tradukitaj de iu talentita poeto, kies nomon ni bedaŭrinde ne konas. Jen du pruvoj:

Belega fraŭlino el Nigro
Eliris por rajdo sur tigro;
La rajdo finiĝis,
Ĉar ŝi internigis,
Kaj grase ridetis la tigro.

Strigo maljuna sur kverko sidadis;
Kaj ju pli li aŭdis, des malpli diradis

Ju malpli li diris, li aŭdis despli,
Mi volus, ke ĉiu similu al li!

Similaj klubbultenoj en aliaj kluboj multe helpus plialtigi la ĉeestantaron dum la kunvenoj. La loka gazeto "Canberra Times" ankaŭ raportas regule pri la kunvenoj de la klubo. S-ano N. Gamble, la vigla sekretario de la societo, regule informas la redakcion pri la klubaj aranĝoj.

● **SYDNEY:** La printempo venis tre frue al Sydney ĉi-jare, ĉar jam en Aŭgusto ni pentris kaj plibeligis nian Klubejon. Dankon al la volontuloj, kiuj tion faris.

Inter la preleĝoj de tiu ĉi periodo, ni volas precipe menci tiujn de S-roj Eljot kaj Asselin. S-ro Eljot tre pensigis nin, parolante pri la ekzisto aŭ neekzisto de regnoj kaj dioj.

S-ro Asselin gvidis nin al Fiĝio, kie ni ĝuis dum duonhoru liajn spertojn en tiu interesa kaj paca landeto de bananoj kaj sunbrilo.

Ciam estas interese, revizii la pasintecan, kaj lerni la historion de la loka movado. Ni dankas al F-no Smith viglan rakonton pri la pasintaj jaroj, kaj pri la pioniroj, kiujn ŝi bone konis.

En la fino de Julio, S-ro Perry parolis pri Esperanto en kunveno de la Universitata "Internacia Klubo", kaj oni tre simpatie ricevis lin. Ni esperas, pli prilabori tiun grundon post la jaraj ekzamenoj.

Malfreue en Aŭgusto, nia prezidanto, S-ro Matasin, libertempis en Kvinslando. Ni esperas, baldaŭ aŭdi pri tio, kaj vidi la kolorajn bildojn, kiujn li certe faris.—E.D.

● **DEVONPORT (Tas.):** Nia klubo bone progresas sub la entuziasma gvidado de s-ro W. Gerard. Dum la lastaj 2 monatoj aniĝis kelkaj novaj membroj kaj ni penas ke ĉiu

atingu la saman nivelon. Ĉar mankas al ni sperta E-parolanto, ni esperas kolekti sufiĉe altan monsumon por aĉeti la "Linguaphone E-kurson", kiu, ni esperas, estos granda helpilo por ĉiu membro. Ni provis aranĝi malgrandan E-ekspozicion dum la Agrikultura Foiro, sed bedaŭrinde la aranĝintoj ne simpatiis kun nia afero kaj ni devis rezigni de tiu plano.

Pere de anoncoj en E-gazetoj la plejmulto de niaj anoj nun havas korespondantojn en aliaj landoj kaj ili tre entuziasmiĝis pro la facileco de tiu korespondado kun siaj novaj amikoj. Ni esperas organizi "Sociajn Vesperojn" en la hejmoj de membroj por instigi ilin.—M. W. Ives.

● **NEWCASTLE (N.S.W.):** Meze de oktobro ni komencis novan klason. Partoprenas 8 junaj geknaboj kaj sama nombro da plenkreskuloj.—Rees Perry.

Adelaide ne sendis raporton.

9A AŬSTRALIA E-KONGRESO

(1-7 Jan., 1954, Perth, W.A.)

La kongreskomitato ellaboris tre detalan programon, sed ĉar kelkaj punktoj estas ankoraŭ dubaj, ni publikigos ĝin nur venontnumere. Jam nun ĉiuj vizitantoj estas urĝe petataj informi pri ĝusta alventago kaj tempo la Lokan Kongres-Komitaton, por ke anoj povas atendi ĉe la stacidomo, haveno aŭ aerodromo. Ĉiujn leterojn sendu al: W.A. Esperanto - League, Room 16, Bacton House, 723 Hay St., Perth.

5-a Listo deAliĝintoj:

51. S-no O. Glenie- (Melbourne)
52. D-ro Fred Williams (Melb.)
53. D-rino V. Summers (Perth)
54. S-ro S. Burŝtejn (Melb.)

Proponoj por la kongreso oni sendu tuj al A.E.A. Box 2122T, G.P.O., Melbourne. La diversaj ŝtataj klubkomitatoj estas petataj detale diskuti planojn por la agado de AEA dum la sekvontaj 2 jaroj, sed ankaŭ proponoj de izolaj membroj estas treege bonvenaj.

ARANĜU EKSPOZICIOJN!

Dum lasta Junio ni aranĝis E-ekspozicion, kaj ni jam ricevis peton, ke ni pruntedonu al la Pertaj samideanoj, la materialon uzitan. Tion, kompreneble, ni tre volinte faros, sed venis al ni la penso, ke eble aliaj

grupoj ŝatus ankaŭ prunti la materialon, kaj aranĝi ekspoziciojn en siaj urboj.

Pro tio, ni prezentas la jenajn notojn:—

Ni tre volonte sendos la materialon al aliaj grupoj, kondiĉe, ke tiuj repagu al ni la poŝtelspezojn, kaj poste tre zorgo enpaku ĝin kaj resendu ĝin.

Pri niaj spertoj: Ni uzis panelojn, proksimume 4. x 3 futoj, kiujn ni feliĉe povis prunti de la Canberra Arts Society, kies halon ni uzis. Aliaj grupoj bezonas ion similan.

La aranĝo de la materialo estis laŭ la katalogo, kiun ni ankaŭ sendos kun la materialo. La materialo estas en leterujoj, kiuj estas numeritaj 1, 2, ktp, laŭ la paneloj. (Notu, tamen, ke iuj aĵoj montritaj ne estas la propraĵo de nia klubo, sed de individuoj en aliaj ŝtatoj,—ekz., la infanartdesegnaĵoj apartenas al S-ro Chandler, en Sidnejo—kaj tiuj aĵoj estas resenditaj al la posedantoj.)

Pro tio ni konsilas, ke aliaj grupoj kiuj intencas aranĝi ekspozicion, enmetu anoncojn en "La Rondo", kaj ankaŭ en "Esperanto"—kaj zorgu, ke tiuj anoncoj aperu almenaŭ tri monatojn antaŭ la ekspozicio! Per tia metodo, oni ricevos multe da materialo de diversaj landoj, kaj la ekspozicio pograde pligrandiĝos.

Estas necese, havigi multe da reklamoj antaŭ—en la loka gazeto, per radio, ktp. (Eble tia afero estas pli facile aranĝita en malgranda urbo, kiel Canberra, kun loĝantaro de nur 27,000—estas facile, kaj ne tre multekosta, publikigi novaĵojn.) Ni ankaŭ presigis (ciklostile), invitojn, kiujn ni sendis al organizaĵoj bonkonataj personoj, kaj amikoj de klubanoj, ktp.

Ĉe la ekspozicio mem, ni vendis katalogojn po 1/-, kiel oni kutime faras ĉe art-ekspozicio; en tiu ĉi ni disdonis ankaŭ, represon de la artikolo pri Canberra, el "Esperanto", Februaro 1953.—Harry Torr.

FAMA ESPERANTISTO PAROLAS:

"En multaj lokoj ekzistas lokaj eminentuloj, kiuj apenaŭ havas ian komunecon kun la nova generacio, kaj kiuj anstataŭ tio, ke ili transdonus siajn spertojn al la novuloj, kontentigas esti legendaj figuroj, starante rigide sur la piedestaloj de la loka eminenteco. Multaj el ili admiras nur

sin mem." (D-ro F. Szilagy, en "Arbetar Esperantisten" 2/3, p. 8.) Ĉu ankaŭ en Aŭstralio??

ITALOJ KONSILAS:

"La 3-a kunveno de la naciaj estroj de la itala E-istaro, kunveninta en Milano la 19-an de aprilo, ekzamenis la situacion pri instruado de E-o kaj lingva preparo de la grupoj. Oni devas antaŭ ĉio aldoni seriozecon al la instruado de E-o, severe ekzamenante tiujn kiuj poste zorgos publikajn kursojn. La kunveno instigas la grupojn plialtigi la esperantan kulturenan nivelon. Necesas eduki la E-istojn kaj tion oni povas fari nur en la kursoj kaj per la kursoj mem; estu tiu edukilo tiel morala kiel lingva, per instruado de la movada historio, de ĝia literaturo, de ĝiaj idealaj enhavo." (L'esperanto—Torino, N-ro 19.)

Jen bona konsilo por niaj grupoj!

SAT Jarlibro, 1925-1953, 153 paĝoj. Eld. Sennacieca Asocio Tut-monda por la uzo de siaj anoj. Enhavas adresaron kaj informojn pri la statutoj, literaturo, ktp. de la organizaĵo. Krome ĝi enhavas vortojn kaj muzikon de tri himnoj; tabelon de la ĉefaj monoj kaj iliaj kurzoj; kaj kurzon de la usona dolaro en pluraj monoj. Aparte interesa estas la sekcio "Demografio" kiu ampleksas naŭ paĝojn da statistikoj pri la homkvanto, areo kaj loĝdenseco de ĉiu parto de la terglobo.—I.P.H.

Fingrulo, de Andersen, trad. el la germana Prof. D-ro H. Sirk. Libreto bindita. Bildoj de Gerda Born. Prezo 4 inter. rspk. Eldonis Waldheim-Eberle, Vieno 7, Seidengasse 3-11, Aŭstrio.

Tiu ĉi ĉarma fabelo de Andersen akiras pluan ĉarmon per la kursiva preso kaj per la ilustraĵoj kiuj ornamas ĉiun paĝon. Delikataj laŭ desegno kaj koloroj, la bildoj bele akordas kun la fantazio de la historiisto. Sendube multaj geonkloj kiuj aĉetos ĉi tiun libron por juna parenco, decidus aĉeti pluan ekzempleron por si mem.—I.P.H.

Sennacieca Revuo, 1953. Eldonis Sennacieca Asocio Tut-monda, 67 avenue Gambetta, Paris-20. Prezo aŭstralio; 5 ŝilingoj ricevebla ĉe Grace Barlow. C/- P.O. Toowoomba, Queensland.

Esperable ĉi tiu, la dua postmilita kajero de Sennacieca Revuo, rikoltos same favoran akcepton kiel ĝia lastjara antaŭulo. Denove oni devas rimarki la objektivcon kiu estas gvida principo de la verkantoj, malgraŭ iliaj fortaj konvinkoj.

Entute 13 kunlaborantoj kontribuis artikolojn, kaj la multflanka enhavo ampleksas tre diversajn temojn. Ekz. troviĝas "Pensoj kaj agoj de nunaj Japanoj" de J. Jamaga; "La ideologia dramo de L. L. Zamenhof" de G. Waringhien. Raymond Schwartz kontribuas spritan artikolon kiu estas samtempe amuza kaj sukoriĉa. J. Regulo-Perez analizas la internajn vivofortojn de "okcidenta" kaj "orienta" sistemoj kaj esploras la konsiston de komunismo por eltrovi el kio fontas ĝia forto. Lia konkluda paragrafo estas pripensenda por ĉiuj studentoj de mondpolitikoj. F. Faulhaber pledas por revivigo de niaj klasikuloj, kies verkoj estas jam ne riceveblaj. La multaj ilustraĵoj donas plaĉan aspekton al la paĝoj.

—I.P.H.

"POST LA KURSO", Wilh. kaj Hans Wingen. Eld. Limburger Vereinsdruckerei. 100 pj. Prezo Gm. 3.60.

La fratoj W. estas fidelaj instruantoj; jen konriĉa kaj anekdota kompendio por ĉiu E-isto scianta la Germanan. Ne nur la strukturon de E-o ĝi trafe pritraktas sed ankaŭ elastajn vortojn: doch, erst, gerade, allein k.c. Ĝi atentigas: Ne uzu "pluen", ĉar "plu" indikas ne lokon sed daŭron. Ne uzu "ajn" post "iu", ĉar "iu" jam propre enhavas en si "ajnecon". Uzo de "sia" ankaŭ tie, kie ĝi ne rilatas al la subjekto de frazo, ekz-e, "Metu ĉion en sian lokon". "Oni admiris la reĝon kun sia krono".

Kiel VI tradukus: Mi iris sole ĝis la arbaro?

LA FELIĈO. Sep noveloj. Fremdlingva Eldonejo, Peking. 150p. Tradukoj el la aŭtenta Ĉinia literaturo en la Anglan estas tre maloftaj. Ĉiu homo, deziranta scii pri la Ĉina popolo alie ol per la represaj artikoloj de la prestrustoj, akirus tiun serion, klare tradukitan kaj daŭre atentotiran. Poŝtkarto al 38 Suchow Hutung, Peking, sendigos ĝin al vi.

—F.R.B.

ZAMENHOF - FESTO

Wednesday, Dec. 16, 8 p.m., Henry George League (18 George Pde.): Welcome to Miss Lorna Samblebe, back from the Zagreb Congress.

Subscriptions Received:

Mrs. Fes 30/-, Mr. Parry, 32/6, Mr. Burstein 10/-.

KIAL HAZARDLUDI PRI VIA VIVKUNULO?

Se vi estas soleca oni prezentos vin al la por vi plej taŭgaj amikoj. Multaj solencaj geviroj, novaj kaj malnovaj aŭstralianoj kaj transmariuloj el ĉiu vivsfero, aĝgrupo kaj religio estas anoj de nia Internacia Korespondklubo. Nenia devigo. Konfidenca. Senkosta informo havebla en blanka, sigelita koverto. Skribu hodiaŭ kaj aldonu reafirmon al: Milson's Friendship (Regd.) Club, Dept. 13, Box 2871, G.P.O., Sydney, Aŭstralio.

KLUBAJ INFORMOJ:

Melbourne Esperanto Club kunvenas ĉe Henry George Club, 18 George Parade (for de 113 Collins St.) ĉiumerkrede je la 8a. Sek. S-ro H. M. Cohen, 83 Youngman St., Preston, N.18 (Tel.: JU 3572).

Canberra Esperanto Club kunvenas ĉe "Riverside", ĉiun lastan lundon en la monato, je la 8a. Sek. S-ro N. Gamble, 27 Froggatt St., Turner, ACT. (Tel.: 688 aŭ F 04).

Sydney Esperanto Club kunvenas ĉe 12 Ennis Rd., Milson's Point (stacidomo) ĉiujaude je la 8a. Sek. F-ino Edna Dash, 26 Edgeware Rd., Enmore.

Brisbane Esperanto Society kunvenas Room 78, Albert House, King George Squ., ĉiun 2-an kaj 4-an mardon en ĉiu monato de Februaro ĝis Novembro, je la 7.30a. Prez. S. L. Parry, Ford St., Albion (Tel.: M6097).

Okcident - Aŭstralia E-Ligo kunvenas ĉe Bacton House (ĉambro 16), 723 Hay St., Perth, ĉiun 2-an kaj 4-an jaŭdon en ĉiu monato (krom Decembro kaj Januaro) je la 8a.

Devonport Esperanto Club kunvenas ĉe Adult Education Rooms, ĉiulunde je la 8a. Sek. S-ro M. W. Ives, Box 24, East Devonport, Tas.

Al Niaj Legantoj

Ni esperis eldoni Nov./Dec. eldonon de "La Rondo", sed nia presisto informis presejo ne povos pretigi alian numeron antaŭ la kristnaskaj festotagoj.

Ni tion ege bedaŭras, sed deziras rekompenci niajn legantojn per 12- aŭ 16-p en Januaro 1954. Por la kristnaskaj kaj novjaraj festotagoj ni sendas al ĉiuj s nia vasta kontinento la plej korajn bondezirojn.

Per la Estraro de la
AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOC.
Herbert Koppel, Landa Sekre

9-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso

1-a ĝis 7-a de Januaro 1954 - Perth, W. A.

- Vendredo: Alveno de la delegitoj
- 1.1.54 6.00 p.m. Akcepto-manĝo & "Preskonferenco" en Shaftesbury Hotel
9.00 Interkoniga Vespero en McNess Hall, Pier Street
- Sabato: 10.30 a.m. Solena Malfermo de la Kongreso
- 2.1.54 12.00 Kolektiva Lunĉo en King's Park
1.15 p.m. Aŭtobusa Rondveturado tra la urbo.
3.00 D-rino V. Summers "Esperanto in relation to teaching & learn Languages." (Prelego en McNess Hall)
- Vespere: Filmoj en McNess Hall
- Dimanĉo: 9.30 a.m. Di-Servo, St. Bartholomew's, East Perth. S-ro Edwin Moore pr
- 3.1.54 2.30 p.m. Boat-Ekskurso sur Swan Rivero E
8.00 Prelego pri literaturo laŭ manuskripto de s-ino Hanks kaj ŝe de Raymond Schwartz, prezentitaj de s-ro H. Koppel (ĉe Dro E
- Lundo: 9.00 a.m. A.E.A. Jarkunveno, 1-a Kunsido (McNess Hall)
- 4.1.54. 11.00 Malfermo de la Kongresa Ekspozicio en Boans Fashion Salon.
12.00 (eble) Akcepto ĉe la urbestro
2.30 p.m. A.E.A. Jarkunveno, 2-a Kunsido (McNess Hall)
8.00 2 Prelegoj laŭ manuskriptoj de s-roj Towsey & Banham.
Poste vizito al King's Park.
- Mardo: 9.00 a.m. Seminario: D-ro Fridenbergs: "Gramatikaj Malfacilaĵoj".
- 5.1.54. 11.00 Disdono de Masel-Premioj por 1953.
2.00 p.m. Seminario: D-ro Fridenbergs: "Naciismoj en Esperanto".
3.30 Fakkunsidoj (Komitatoj, UEA, SAT, Instruistoj ktp.)
8.00 Prelego pri literaturo laŭ manuskripto de Pastro Cowling kaj D-ro Fridenbergs pri "Renkontiĝo kun famaj Esperantistoj".
- Merkredo: 9.00 a.m. Seminario: D-ro Fridenbergs: "Evoluo de Esperanto".
- 6.1.54. 11.00 Oficiala Fermo de la Kongreso.
1.00 p.m. Kolektiva Lunĉo ĉe "Cottesloe Civic Centre".
2.30 Ekskurso per aŭtomobiloj laŭlonge de la marbordoj.
8.00 Internacia Koncerto en Assembly Hall.
- Ĵaŭdo: Tuttaga Ekskurso en privataj aŭtomobiloj aŭ aŭtobuso.
- 7.1.54. Anoncu vian alvenon en Perth por ke komitatanoj povos atendi vin.
Skribu al: W.A. Esperanto-League, Room 16, 723 Hay St., Perth.